Österreichische Nationalbibliothek
Zeitschriftensaal

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la austria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Austrio. — Telefono U 20-3-51

NRO 1-3
3-a JARO
JANUARO-MARTO 1948

EL LA ENHAVO:

Problemoj por la UK en Malmö
La horloĝmuzeo de la urbo Vieno
La fondiĝo de la Theaterzeitung
Ekkrio de Aŭstrio al la mondo
La Esperanto-movado en Aŭstrio
Informoj de la Laborista Esperantistaro
Katolika Esperanta Vivo
Bibliografio

LASTA INFORMO:

La Aŭstria Esperanto-Kongreso 1948 okazos en Linz inter la 12.—15. de Aŭgusto 1948. Kongreskotizo 10.— ŝ, por familianoj 5.— ŝ. Pluaj detaloj sekvos. Preparu vin jam nun por la kongreso!

AUSTRIA ESPERANTO-REVUO oficiala organo
de Austria Esperantista Federacio kaj de Austria Esperanto-Instituto
Adreso: Wien I., Neutorgasse 9, Austrio
Abonprezo: Jarabono aŭstr. ŝil. 24.— aŭ egalvaloro.
Por membroj de AEF senpage.

KORESPONDADO

Kiu volas korespondi kun en- au eksterlandaj geesperantistoj, sendu sian korespondpeton al la redakcio de AER. Ni publikigos ĝin laŭ la disponebla loko.

Unua korespondanonceto dulinia por AEF-anoj senpaga. Plua anonceto kaj por aliaj personoj kostas ŝil. 4.—, por eksterlandanoj 4 int. respondkuponoin. Ni petas skribu la adresojn nepre bone legeble!

Mallongigoj: L = leteroj; PK = poŝtkarto; PM = poŝtmarko.

Aŭstrio. — F-ino M. W. Halbedl, Knittelfeld, Schmittgasse 17/II, Steiermark, 19 j. kontoristino, kor. kun ĉ. 1.

S-ro Ernst Maschek, Knittelfeld, Stubalpenstraße 19, Steiermark, kor. per L kaj il. PK kun ĉ. 1.

F-ino Johanna Staudacher, instruistino en Fieberbrunn, Tirol, kor. kun geinstruistoj el tutmondo.

S-ro Ladislaus Tabaka, Ranzhofen, Klosterstraße 2, bei Braunau am Inn, Ob.-Österreich, kor. per L, PK, interŝ. PM kaj petas je E-gazetoj kaj div. E-ajoj por aranĝi ekspozicion.

S-ro Josef Bogner, Mauternbach 12 bei Krems, N.-Ö., kor. per ilustr. PK kun junaj geesp-istoj ĉ. l.

Francujo. — S-ro Rajmond Petit, 4. Rue Dumont d'Urville, La Garenne Colombes, Seine, j. edukisto por malfacile edukeblaj inf., kor. pri ĉi tiu temo kun edukistoj ĉiulande.

Germanujo. — S-ro Josef Duffner, (17a) Ettlingen, Luisenstraße 6, kor. kun aŭstriaj kaj alilandaj ges-anoj.

S-ro Erich Zöllich, (22b) Idar-Oberstein 1, Neuweg 22, 26 j. horloĝisto, kor. kun austr. samprof. kolegoj kaj aliaj s-anoj.

S-ro inĝ. Georg Sornek, (13 b) Fürsteneck, (über Passau) Niederbayern, kor. kun aŭstriaj kaj aliaj ges-anoj.

S-ro dipl. inĝ. Karl Wiencke, (24) Geesthacht-Elbe, Schillerstraße 5 kor. kun teknikistoj kaj sciencistoj pri la problemo de la rato-ekstermado.

Nederlando. — S-ro J. van Ommen, van der Palmstr. 101, Gouda, 23 j. oficisto, kor. kun aŭstria k-dino de 21 jaroj.

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

3-a jaro JANUARO / MARTO 1948 n-ro 1—3

Enkondukaj vortoj, parolitaj ĉe la unua esperantista kulturfesteto, dimanĉon, la 15an de Novembro 1947:

Tre estimataj ceestantoj!

Mi kore salutas vin ĉiujn, gesamideanoj, kiel Esperantistojn kaj homojn, kiuj ŝatas seriozan uzon de Esperanto. Kiel vi certe jam rimarkis el nia programo, niaj temoj ja estas seriozaj kaj ne tre facilaj. Sed homo kun evoluinta spirito sopiras kelkfoje dediĉi sian animon ankaŭ al seriozaj, meditigaj pensoj, kaj cetere ankaŭ laŭ lingva vidpunkto estas bezone, prezenti iafoje pli altnivelajn paroladojn, por ke la lernemuloj de nia lingvo povu perfektigi sin.

Tial ni reprezentantoj de diversaj mondrigardoj, sed ĉiuj konvinkitaj Esperantistoj, decidis, instigite de la sukcesoj de la pasintaj Zamenhof-festoj, provi vere valorajn aranĝojn kun klasika muziko kaj bonaj paroladoj, por pli-vastigi la aplikon de Esperanto ankaŭ al temoj ekster la kadro de ĝia movado. Sed por ke vi ĝuste komprenu la celon de niaj aranĝoj, permesu al mi, antaŭ ilia komenco fari kelkajn antaŭklarigojn pri la mondrigarda bazo, de sur kiu ni volas priparoli diversajn problemojn de nia tempo, kaj kial ni elektis Esperanton por tiu celo. Estas klare, ke ĉiuj temoj de praktika filozofio, tio estas la demandoj pri la sinteno en la vivo individua, familia, societa, nacia kaj tuthomara, iel tuŝas la mondrigardajn konceptojn, kiuj nuntempe tiel akre interbatalas sur la monda scenejo. Kompreneble ni Esperantistoj, kiuj deziras laŭ la intenco de nia nobla majstro nenion alian ol la interfratiĝon de la popoloj kaj la ĝeneralan rekonon de l' pura homeco kiel plej supran principon por ĉiuj popoloj, ni en niaj komunaj aranĝoj ne povas stari sur alia fundamento ol la neŭtrale homa, aŭ se vi ne ŝatas la vorton „neŭtrala", ni diru sur starpunkto superpartie homa, kio estas per iom da amo trovebla malantaŭ ĉiuj diferencoj de l' ekstera kaj interna naturo, komuna al ĉiuj rasoj kaj popoloj, al ĉiuj mondkonceptoj kaj vivmanieroj, al ĉiuj religiaj kaj politikaj sistemoj. En ĉiuj tiuj formoj troviĝas la homo, kaj mi estas konvinkita, ke ĉiuj problemoj de nia tempo, ja ĉiuj problemoj de l'homa kunvivado estas solveblaj nur per malpligravigo de la diferencoj kaj per

pli akcentado de la komunaĵoj. Inter tioj, kioj disigas la homajn gentojn, estas ankaŭ la lingva ĥaoso. Kompreneble ekzistas ankaŭ aliaj diferencoj, kaj samlingvanoj ofte malkonkordas pro diversaj aliaj kaŭzoj. Tamen unu kondiĉo estas la lingva interkompreno. Estis nia kara majstro Zamenhof, kiu komprenis la gravecon de komuna lingvo por la ekformiĝo de komuna, tuthomara etiko. Kaj ĉar liaj aspiroj estis ne nur lingvaj, sed profunde homamaj, li inspiris sian verkon per tiu sento de tutmonda frateco, la tielnomita interna ideo de Esperanto, kiu estas la ĉefa instigilo por la nesubpremebla disvastiĝo de Esperanto. Kaj kiam lia verko jam estis enradikiĝinta en la plej multaj landoj de la tero kaj kiam li sentis alproksimiĝi la finon de sia vivo, li kvazaŭ spiritan testamenton postlasis al ni siajn planojn pri supernacia politiko, tutmonda religio kaj vere homa etiko. Ĝi estas konata sub la nomo „Homaranismo". Ĝi vivigas nur per Esperanto kaj enpenetras, eĉ ne volite, preskaŭ ĉiujn Esperantistojn, vastigas iliajn spiritojn kaj nobligas iliajn korojn. Efektive ni spertas, ke Esperanto helpas kompreni ankaŭ aliajn mondrigardojn kaj helpas kompreni iliajn reprezentantojn kiel homojn. — Sed ni nun ne pensu unuavice pri nia lingvo, sed pri la idea enhavo de la homaranismo. La homaranisma etiko ja estas esprimebla per unu simpla, pramalnova devizo, kiu gvidis jam multajn religiajn kaj filozofiajn profetojn de la homaro: „Kion vi ne deziras, ke oni faru al vi, tion vi ankaŭ ne faru al aliaj!" Tiu sola maksimo sufiĉus, kaj se ĉiuj homoj sekvus aŭ eĉ nur klopodus sekvi ĝin, jam ne estiĝus kvereloj kaj militoj.

Sed mi volas aldoni ankoraŭ duan maksimon, pli specialan, kiu ŝajnas al mi same grava por la kunvivado de la homoj: „Ne rigardu homon, kiu havas aliajn opiniojn ol vi, pro tio kiel vian malamikon! Respektu alian konvinkon, eĉ en via kontraŭulo!" La fidevizo „Se vi ne volas esti mia frato, mi devigos vin per bato!" estas nun el la plej malfeliĉigaj devizoj de la regemuloj. Ni ja povas kaj devas ankaŭ vivi kun aliopiniantoj. Kaj se vi nepre ne povas harmonii kun unu el ili, ja nek vi nek li rajtas ofendiĝi aŭ ekscitiĝi, sed vi simple rezignu debati pri la diferencaj opinioj, kaj ambaŭ rigardu sin reciproke indiferentaj. Sed se ili estas homoj bonvolaj, ili baldaŭ rimarkos, ke per la komuna rezigno je kverelado ili eltrovos la homan komunecon kaj ili povos en reciproka respekto premi al si la manojn pro la nomo de la plej universala ideo kiu ligas ĉiujn homojn sur la tero: tio estas la homeco.

Mi opinias, ke tiujn ideojn povas konsenti ĉiuj homoj, al kiuj ajn mondrigardoj ili apartenas. Sed ĉar ni Esperantistoj krom tio havas eĉ pli konkretan komunan ideon, kiu nin ligas malgraŭ ĉiuj diferencoj truditaj de la publikaj kaj privataj vivcirkonstancoj, tio estas la Esperantismo, tial mi kredas, ke vi, gesamideanoj, komprenos niajn

fundamentajn ideojn, kiuj estas tre similaj al la tielnomita „etika movado“, kiu celas instrui kaj disvastigi humanan moralon sendepende de ĉiaj mondrigardoj.

Sur tiu ĉi bazo ni volas aranĝi niajn esperantistajn kulturfestetojn; kaj ni esperas, ke ili sukcesos gajni viajn plaĉon, aprobon kaj moralan subtenon.

Problemoj por la Universala Kongreso en Malmö

Apenaŭ finiĝis la unua postmilita U. K. en Bern, jam traflugis la mondon novaj invitiloj kaj afiŝoj invitantaj al la sekvonta U. K. en Malmö.

Pripensante la rezultojn de la Berna kongreso oni povas konstati, ke ili n e konformas al la esperoj, kiujn la plej multo de la seriozaj Esperantistoj ĉiulande nutris en siaj koroj. Laŭ raportoj de ĉeestintaj kongresanoj kaj laŭ la diversaj gazetkomunikoj ankaŭ ĉi tiu U. K. por la plej multaj partoprenintoj estis pli t u r i s m a afero ol kongreso, serĉanta kaj interkonsiliĝanta la laŭeblan solvon de diversaj problemoj de la internacia Esperanto-movado.

Miaopinie la sola pozitiva problemo, kiun solvis la kongreso estis la reunuigo de IEL-UEA en unueca internacia organizo. Sed nesolvita restis la i n t e r n a organiza problemo je kiu suferas la Esperanto-movado, kaj kiu jam delonge ĉiam denove estas diskutata inter la Esperantistaro. Restis la individua membreco al la nova UEA, kiu organiza formo laŭ sia strukturo neniam povas internaciskale konduki al vasta antaŭenpuŝo de la movado. Tion nur povus internacia movado, kiu estus streĉe organizita laŭ l a n d a j kaj l o k a j organizoj kun d e m o k r a t e elektitaj, sed r e s p o n d e c a j delegitoj.

La nuna delegitsistemo de UEA certe ankaŭ havas bonajn ecojn rilate al diversaj gravaj servoj por la Esperantistaro, tamen r e k t a n respondecon pri la Esperanto-movado en la respektiva lando ili ne havas en la kadro de internacia organizo, antaŭ elektita internacia estraro kaj en Universala Kongreso.

La sistemo de landaj kaj lokaj suborganizoj kun respondecaj al la internacia organizo funkciuloj, utile funkcias en multaj grandorganizoj. Adaptata al la specialaj bezonoj de Esperantista organizo internacia ĝi ankaŭ devus esti kreata en la tutmonda Esperanto-movado.

Certe la nunaj cirkonstancoj en multaj landoj pro la postmilita situacio, politike, ekonomie kaj finance provizore ne estas taŭgaj por tuj konstruadi organizan formon kun respondecaj landaj — kaj lokaj estraroj kaj delegitoj. Tamen estus urĝe necese, ke la estraro de UEA funde kaj detale studadu kaj ellaboru novan, pli taŭgan organizformon

kaj komuniku ĝin al la Esperantistaro tutmonda por diskutado de la projekto.

Ĉiam pli ofte aŭdiĝas la plendoj pri la organiza afero en vastaj Esperantistaj rondoj, kion certe ankaŭ devas scii la estraro de UEA, sed ĝis nun ni ne aŭdis aŭ legis, ke tiurilate io estis entreprenata. Prisilento ankaŭ estas eco de politiko, sed per tio oni daŭre ne povas mutigi la opoziciajn voĉojn en la movado. Jam cirkuladas tra la mondo flugfolioj pri kreado de nova Esperanto-Mondorganizo. Kio estas necesa n e estas la starigo de nova organizo — en Esperantujo vere ekzistas jam tro multaj — sed adaptiĝo de la ekzistanta organizo al pli bonaj kaj pli efikaj organizformoj.

Mi dubas, ĉu la kelkaj monatoj antaŭ la kongreso en Malmö sufiĉas, por povi ellabori novan strukturon de UEA kaj diskutigi ĝin per la Esperantista gazetaro kaj por findecidi pri ĝi en la U. K. Sed en la kongreso la estraro de UEA povus almenaŭ proponi al la kongresantoj novan organizprojekton por ĝenerala diskutado sen findecido. Per tio la UEA-estraro gajnus bildon pri la ĝenerala opinio kaj utilajn sugestojn, kiujn ĝi povus eluzi kaj poste la tutan plibonigitan projekton publikigi en la Esperanto-gazetaro, por ke la tuta Esperantistaro povu partopreni en la diskuto pri la plej bona formo.

Dume eventuale povus formiĝi Landaj kaj Lokaj Organizoj de UEA kun respondecaj funkciuloj (delegitoj), kiuj en la U. K. 1949 decidu pri la definitiva organiza strukturo de UEA, pri la financado ktp. Certe post nur unu jaro la organizo ankoraŭ ne funkcios perfekte, sed per la gajno de la intereso pri la internacia organizo tiu stato pliboniĝus per la tempo.

Tia sistemo ankaŭ havigus al bone laboranta UEA-estraro pli grandan aŭtoritaton ol ĝi nuntempe havas kaj ĝi povus pli sukcese agi sur ĉiuj internaciaj kampoj kaj la U. K. ne fariĝus unuavice turismaj aranĝoj.

U. K., en kiu estas serioze pritraktataj de respondecaj landaj delegitoj ĉiuj gravaj aferoj de la tutmonda movado, tia kongreso samtempe devus esti la publika tribuno por montri al interesiĝantaj aŭtoritatuloj la praktikan valoron de internacia kongreso, diskutanta siajn problemojn nur per k o m u n a lingvo.

Al tia kongreso devus esti invitataj el tutmondo: ĉiuj registaroj, gravaj parlamentanoj, la ĝeneralaj direktoroj de ŝtataj aŭ privataj poŝt-, fervoj- kaj ŝiptrafikaj administracioj, la estroj de la grandaj internaciaj turismaj entreprenoj, la estraroj de internaciaj sciencaj asocioj, la estraroj de internaciaj sindikataj aŭ fakorganizoj kaj de la politikaj partioj kaj aliaj gravaj institucioj.

Kiom multaj estas la problemoj, kiuj atendas por esti solvataj! Gazetartikolo ne sufiĉas por detale elmontri ilin. Kompreneble tiajn

gravajn taskojn nur povas sukcese pritrakti kongreso, vizitata de disciplinitaj kaj seriozaj delegitoj.

Ne plu devas inter alie reokazi la honto de Bern, ke germana Esperantisto ne povis saluti la kongreson, ĉar kelkaj alilandaj delegitoj minacis al la kongresestraro fari skandalon, kiam ĝi donus al la germano la parolon. Aŭdinte tion, la germana samideano mem rezignis la parolon kaj per tio la malagrabla situacio estis savata.

Sed kiel Esperantisto oni devas demandi, ĉu tiuj s-anoj, kiuj malhelpis la salutvortojn de la germana s-ano, estis v e r a j Esperantistoj laŭ la senco de la i n t e r n a i d e o de Esperanto? Ŝajnas, ke ili per sia minaco kondutis pli kiel „n a c i i s t o j" anstataŭ kiel Esperantistoj. Kiamaniere ni do klarigu al la mondo, ke Esperanto servas por pacigi la diverslingvajn naciojn, kiam en la plej grava kunveno inter Esperantistoj tutmondaj povis okazi tia netoleremo?

Kontraste al tiu okazintaĵo en Bern, la SAT-kongreso en Aarhus publike esprimis la bedaŭron pro la foresto de germana delegacio, kiu ne ricevis la vojaĝpermeson kaj per tio la SAT-kongreso manifestis pli bonan Esperantistan spiriton.

Esperanto estas planto, kiu nur povas flori kaj kreski en kampo d e m o k r a t a. Zorgu ni tial, ke la kongreso en Malmö ankaŭ tiurilate okazu en medio t o l e r e m a kaj demokrata, en medio v e r e E s p e r a n t i s t a.

Alfred Berdan, Vieno.

Esperanto kaj lingvistiko

„Esperantista" — Revuo por Esperanto en ČSR, aperigis en n-ro 9/1947 la suban bonegan artikolon originale verkitan por „Esperantista" de eminenta fakulo, kiun ni pro ĝia graveco por Esperanto plene transprenis por niaj legantoj. — La red.

Multaj Esperantistoj malŝatas la lingvistikon, aŭ almenaŭ al ili ne plaĉas, se la lingvistiko sin okupas pri Esperanto. Ĝis certa grado tio estas komprenebla, ĉar la vorto l i n g v i s t i k o vekas memorojn pri la Delegacio kaj Ido, pri reformproponoj kaj lingvaj disputoj, pri malpaco kaj konfuzo. Tamen eraras tiuj, kiuj atendas nur malagrablaĵojn, aŭ eĉ danĝerojn de la lingvistika okupiĝo pri Esperanto. La lingvistiko estas precipe konstata scienco. La lingvisto, kiu sin okupas pri la lingvo franca, volas nur ĝisfunde pristudi la esencon kaj evoluon de tiu lingvo, li esploras la historiajn kaj psikologiajn motivojn de la ŝanĝoj, pristudas la individuajn elementojn en la lingvo-uzo, ktp. Lia celo ne estas perfektigi la lingvon, sed nur perfekte koni kaj kompreni ĝin. Estas vere, ke kelkfoje la lingvistiko forlasas la teorion kaj rekte konsilas reformojn, sed tion ĝi faras nur kiam temas pri la gepatra lingvo, kaj

eĉ tiam ĝi ne intencas ŝanĝi la lingvon mem, sed nur proponas pli simplajn ortografiajn regulojn aŭ pledas por konservi la lingvan purecon atakante nenecesajn neologismojn kaj protestante kontraŭ lingvaj barbarismoj, kiuj minacas ĝeneraliĝi. Neniu lingvisto serioze pensus pri la ideo reformi sian propran lingvon per enkonduko de nova deklinacia sistemo aŭ per simpligo de la konjugacio. Des malpli li riskus fari tian proponon pri la lingvo de alia popolo.

Esperanto ne plu estas teoria projekto, sed ekzistanta lingvo kun relative granda disvastiĝo. La lingvisto, kiu okupas sin pri ĝi, devas respekti la faktojn, same kiel li devas fari tion studante alian lingvon. Tio tamen ne signifas, ke li ne rajtas kritike prijuĝi la lingvon. Esperanto estas helplingvo, kaj pro tio ĝia ĉefa eco devas esti facila lernebleco por plej multaj popoloj. Necese tamen estas, ke la facileco ne malhelpu la uzeblecon.

Neniu povas malpermesi, ke oni science esploru ĉu Esperanto atingis maksimumajn uzeblon kaj facilon. Kaj same kiel la lingvisto (kaj ĉiu alia) rajtas kompari la lingvojn rusan kaj francan el kiu ajn vidpunkto, same li rajtas kompari Esperanton kun Volapük aŭ Occidental. Neniel estas riproĉinde, se ankaŭ esperantistoj partoprenas al tia kompara esploro, kiu ja havas karakteron pure teorian. Alie status la afero, se iu esperantisto, konstatinte malperfektaĵojn, korektus ilin laŭ sia propra koncepto kaj uzus aŭ propagandus la tiel reformitan lingvon sub la nomo Esperanto. Nur tiam oni povus kaj devus prave protesti, ĉar Esperanto estas la komuna posedaĵo de ĉiuj esperantistoj, kaj neniu unuopulo rajtas enkonduki kontraŭfundamentajn ŝanĝojn, eĉ ne, se tiuj ŝanĝoj estus gravaj plibonigoj. Kiu opinias Esperanton ne sufiĉe perfekta, povas aliĝi al sistemo pli perfekta, kaj se tia sistemo ne ekzistas, li povas krei ĝin. Tiel agante li certe ne estas riproĉinda, kvankam estas tre dubinde, ĉu li kondutas saĝe. Esperanto ja montris sin tre taŭga, kaj krome ĝi posedas la grandan avantaĝon, ke neniu el ĝiaj rivaloj eĉ nur iomete povas konkuri kun ĝi rilate disvastiĝon. Multaj el la lingvistoj, kiuj ĝis nun interesiĝis pri la problemo de lingvo konstruita, samopinias pri tio, ke pri la definitiva sukceso aŭ malsukceso de iu lingvo ne decidos la grado de ĝia perfekteco. Multe pli gravaj estas aliaj faktoroj: jam atingitaj sukcesoj, disvastiĝo, efika propagando k. t. p.

Zamenhof mem estis konvinkita, ke Esperanto ne estas perfekta. Sed tio ne signifas, ke nia lingvo devas timi la komparon kun modernaj projektoj. Mi detale esploris la ĉefajn planlingvojn kaj mia konkludo estis, ke Ido, Occidental kaj Novial certe ne estas pli bonaj ol Esperanto.

Estas evidente, ke la lingvistiko neniel povas malutili al Esperanto kaj ĝia movado, se ĝi okupas sin sole teorie kaj konstate pri la lingvo.

Ĕ male: el objektiva scienca esploro pri la fakta lingvo-uzo povas rezulti nur profitoj por nia movado.

Ke ne ĉiuj lingvistoj volas akcepti Esperanton en ĝia nuna formo, tio tute ne gravas, kondiĉe, ke ili ne tuŝu nian lingvon klopodante enkonduki reformojn. Ke ili provas konstrui novan lingvon, pli konforman al iliaj konceptoj, pro tio ni ne rajtas indigniĝi. Ankaŭ Zamenhof publikigis Esperanton en tempo, kiam alia helplingvo faris grandajn progresojn. Ni povas sincere bedaŭri, ke multaj scienculoj ankoraŭ ne volas akcepti Esperanton, sed ni ne koleru tial, ke ili serĉas alian solvon. Ju pli da lingvistoj sin okupas pri la helplingva problemo, des pli bone, ĉar ilia aktiveco pruvas, ke ankaŭ en sciencaj rondoj oni komencas interesiĝi pri la problemo, kaj la nura fakto, ke la lingvistiko ne plu staras skeptike kontraŭ la ebleco de universala helplingvo, jam povas efiki, ke ankaŭ la ceteraj instruituloj pli ol ĝis nun atentos ne nur la problemon, sed ankaŭ la solvon genian, kiun Zamenhof proponis.

Dr. W. J. A. Manders.

Dedico por la albumo de la neologismemuloj!

„Ni forte evitis neologismojn, novajn afiksojn kaj ĝenerale ĉiajn novaĵojn proponatajn de reformemuloj. Ni sincere kredas, ke la fundamenta Esperanto jam posedas tian kolosan riĉecon, ke al talenta uzanto de la lingvo estas nenecese ĉerpi el aliaj fontoj! ! Tiuj, kiuj trovas grandajn mankojn en nia lingvo, plej ofte montras nur proprajn mankojn: manko de studo, manko de praktiko, manko de talento."

Al ĉi tiuj plej trafaj vortoj de lertaj esperantistoj, kiujn mi legis sur p. 38 de la pompa „Kataluna Antologio", 2. eldono, mi aldonu la memorigon, ke Zamenhof verkis per sia fundamenta Esperanto Ifigenion en Taŭrido, Hamleton kaj siajn aliajn majstraĵojn, ke Grabowski kaj Kabe ekzistis tre longe antaŭ L. M. kaj kun Zamenhof kaj aliaj niaj pioniroj pruvas la pravecon de l' aserto, kiun K. A. esprimas precipe per la frazero, kiun mi substrekis en la supra elĉerpaĵo. Ni evitu la ludemajn poetojn, kiujn ni ne bezonas!

Dr. Adolf Halbedl.

Komuniko de la redakcio

La aŭtoro de la artikolo Pozitiva Paclaboro en numero 10—12/47 de nia Revuo estas nia ŝatata kunlaboranto s-ano Walter Mudrak, Wien, sekretario de AKLE. Pro bedaŭrinda eraro la aŭtornomo ne estis indikata, kion ni per tio ĝustigas.

Esperanton en la familion

„Profeto nenion valoras en sia lando“! tiu ĉi proverbo tutplene estas uzebla por niaj verdstelaj propagandistoj. Kiu ne konas aron da meritplenaj Esperantistoj, fervoraj propagandistoj, senlacaj varbantoj, kies agadon kaj efikon oni volonte emas preni kiel modelon?

Sed okaze vizitante ilin hejme oni devas konstati kaj tion kun iom malagrabla sento, ke ili solaj kaj izole kapablas konversacii en „nia kara“, dum la ceteraj ĉeestantaj familianoj sin retenas kaj tion en la plej bona kazo en centprocenta lingva neŭtraleco. Oni do ne scias, ĉu oni tamen obstine, kuraĝe kaj ne flankiĝante ekuzu „nian karan“ aŭ ĉu oni laŭ regulo konvencia konversaciu en la gepatra lingvo por ĉiuj komprenebla.

Kaj tiu meritplena samideano fakte havas malantaŭ si multjaran kaj ankaŭ sukcesplenan laboron poresperantan. Li jam gajnis belan nombron da novaj adeptoj, sed akurate en la propra familio li ne sukcesis.

Nun estas ja la familio la natura ĉelo de ĉiu homa kunviveco kaj la plej bona medio por lingva ekzerco. Ĉu ni do, karaj gesamideanoj, ne foje provu venki la misteran baron, malpravigi la supre cititan proverbon, kial ni ne foje, kaj se jes, kial ne jam nunjare, provu propagandi, varbi, disvastigi Esperanton sub la devizo „Esperanton en la familion“?

Estas ĉiam plendoj, ke oni ne trovas taŭgan kursejon, ke mankas la ebleco de konversacio, ke oni ne sin sentas sufiĉe lerta kaj sperta por instrui antaŭ fremdaj homoj. Ĉe la familia tablo ŝajnas al mi tre konvena loko, antaŭ aŭ post la familia vespermanĝo sufiĉe da tempo kaj inter la familianaro la ĝusta medio por instrui kaj ekzercadi „nian karan“.

Kiam do venos la devizo: „ESPERANTON EN LA FAMILION“?

L. Grimme.

Afabla letero el Parizo

Kaŭze de la artikolo „Francujo kaj Aŭstrio“ en n-ro 7-9/1947 de AER, ni ĝoje akceptis el Parizo leteron denove montrantan la simpation, kiun ĝuas Aŭstrio en Francujo. Jen ĝia interesa enhavo:

Kiam mi legis la numeron 7—9 de via ŝatinda Revuo, mi atentis kun plezuro la artikolon pri la societo „Francujo-Aŭstrio“, ĉar generalo Béthouart studis en la sama kolegio, en kiu mi estis studinta kelkajn jarojn antaŭe. Tamen nur antaŭ tri jaroj mi eksciis pri li, kiam la gazetoj de la urbo informis la publikon.

Do, anoncante nian komunan lernadon, mi decidis skribi al li, indikante, ke Aŭstria Esperanto-Revuo eldonis bonan tradukon de lia parolado kaj gratulante pro la pacemaj ideoj.

Al tio mi aldonis jenan historieton:

En 1929 (?) mi veturis per ŝipo de Wien ĝis Budapest, kie okazis la Esperanto-Kongreso. En la momento kiam ĉiuj elŝipiĝis, mi diris laŭte al mia edzino kelkajn vortojn en franca lingvo. Tiam apud mi sinjorino ekkriis francalingve: „Ha, vi estas franco! Nu, mi finstudis en urbo Besançon! Dum jarcentoj Francoj kaj Aŭstrianoj militadis, tamen neniam malamante unuj la aliajn!"

La 12-an de Novembro generalo Bethouart respondis, ke mia letero estis al li tre agrabla kaj li dankis min . . . Iom malfrue mi informas vin pri tio. Eble, se okaze io grava postulus lian helpan agadon, vi povus memorigi al li la fakton. Sed mi esperas, ke io tia ne okazos, ke nenio malhelpos vian eldonadon de via bonega Esperantista Revuo, kaj mi sendas al vi tre korajn salutojn.

Paris, 19. 12. 1947. M. Arger.

Bona ago de iamaj austriaj soldatoj kauzis bonan faron

(Ekstrakto el letero de holanda samideano)

Dum la milito multaj aŭstriaj soldatoj en la germana armeo venis Holandon. Iutage ili ankaŭ enmarŝis nian urbeton V. por laŭordone kapti virojn inter 16—40 jaroj, kiuj estis fortrenotaj al Germanujo por tie labori. La aŭstriaj soldatoj ĝenerale estis bonaj knaboj, kun kiuj mi kelkfoje povis paroli mallongtempe. Iam ili venis dumnokte per aŭtomobiloj kun laŭtparoliloj kaj ordonis, ke la viroj fortransportotaj devas stari antaŭ la dompordego en la strato kun manĝaĵoj por du tagoj kaj litkovrilo. Sed neniu viro venis eksteren, preskaŭ ĉiuj trovis kaŝejon. Mi instalis du kaŝejojn en mia domo, en kiu kaŝis sin tri viroj. Neniu enloĝanto rajtis iri en la straton krom la kaptitoj. La tutan tagon ni devis restadi hejme. Aŭstriaj soldatoj venis en la domojn por ordone serĉi kaŝitajn virojn. Sed en nia strato kaj ankaŭ en aliaj ili neniun trovis serĉinte nur laŭŝajne.

Al mi venis knabo (tre juna soldato), kiu rigardis nur en mian suban ĉambron kaj rezignis iri supren. Jen mi diris al li: „Estus bone, se la milito jam morgaŭ ĉesus". Sed li laŭte kriante respondis: „Morgaŭ? Ne, hodiaŭ ĝi devus finiĝi!"

Do en nia kaj najbaraj stratoj la aŭstrianoj tiutage neniun kaptis. Tamen, kiam post kelkaj tagoj la kaŝitaj viroj vespere venis el siaj kaŝejoj por ĉerpi iom da freŝa aero, kelkaj el ili estis kaptataj de la „Gestapo", vestita per civilaj vestoj.

Kiam mi legis en „Heroldo“, ke niaj Vienaj kaj aŭstriaj s-anoj pro la specialaj cirkonstancoj en tiu lando malsatas, mia unua penso estis: „Aŭstrianoj kunbatalis kun la germanoj, tial mi ne helpos al ili“. Sed poste pli funde pensante pri la tuta problemo mi komprenis, ke la aŭstriaj soldatoj estis devigataj batali kun la germanaj mortigintoj same kiel niaj holandaj viroj devis labori por la germana militmaŝino kaj por niaj malamikoj. Speciale mi pensis: „Esperantisto, kie ajn li loĝas, havas internacian koncepton kaj ne povas esti „n a c i-socialisto“.

Mi pensis je la bonkondutaj aŭstriaj soldatoj kiuj intence nenium viktimon tiam trovis ĉe ni kaj mi skribis mian adreson al la redaktoro por povi sendi nutraĵpaketon al Viena samideano.

M. H. K.

Literaturo

Rudolf Kaftan:

La horlogmuzeo de la urbo Vieno

Antaŭ pli ol sepdek jaroj mi havis la eblecon, enrigardi en la sekretplenan radaron de iu tre malnova horloĝo el la Nigra Arbaro (Schwarzwald). La dentradoj estis el ligno, la malgranda pendolo oscilis antaŭ la ciferplato, la marteloj batis je la vitraj sonoriloj. Tiu ĉi meĥanismo interesis min tiel, ke mi longdaŭre devis pensadi pri ĝi. Post kelke da tempo mi povis vidi tute alian malnovan horloĝon, kies radoj estis faritaj parte el ligno, parte el latuno. La pendolo estis longa kaj oscilis ne antaŭ la ciferplato, sed malantaŭe. Ankro jen haltigis, jen ellasis la supran radon. Nun mi volis pli precize esplori la sekretojn de la meĥanismo kaj mi komencis la radojn dispartigi (ne disrompi!) kaj poste ilin denove ĝuste rekunmeti. Baldaŭ mi rimarkis la grandajn diferencojn inter la sistemoj. Konatoj, kamparanoj de mia hejmvilaĝo alportis la plej diversajn specojn de horloĝoj al mi, por ke mi refunkciigu ilin. Tiamaniere pligrandiĝis mia intereso pri horloĝoj, kaj kiam mi venis Vienon kaj mem gajnis monon, mi komencis aĉeti ĉiujn horloĝojn interesajn, kiujn mi povis kapti. Post kelkaj jaroj mia loĝejo estis plena de horloĝoj kaj mi ricevis apartan subtegmentan ĉambreton por mia horloĝkolekto. Horloĝistoj, amikoj, inter ili ankaŭ Esperantistoj, horloĝkolektantoj vizitis mian horloĝ-ĉambreton.

La 19-an de Januaro 1911 mi faris mian unuan lumbildparoladon en la scienca klubo de Vieno pri la historia evolucio de horloĝoj. Mi montris nur bildojn de mia kolekto. Tiu ĉi montrado verŝajne estis la

unua tiaspeca. Pri tiu ĉi lumbildparolado skribis la fakgazeto de la Viena horloĝista societaro kaj internacia gazeto por kolektantoj.

Sekvis kelkaj lumbildparoladoj en la popolkleriga instituto Urania kaj en diversaj kluboj. En la sama jaro 1911 mi komencis la intertraktadojn kun la tiam preparata Teknika Muzeo. Mi intencis estonte unuigi mian horloĝkolekton kun la Teknika Muzeo, por ke oni povu tie ĉi vidi la evoluon de la horloĝoj. La estraro de la estonta muzeo montris grandan intereson por la ideo kaj por miaj horloĝoj, sed deziris ĉion tute senpage! La kolekton kaj la laboron —.



Bildo de antikva horloĝo, kiu montras la tempojn de diversaj urboj de la terglobo.

La 17-an de Aŭgusto 1912 mi vizitis la Esperanto-kongreson en Krakovo kaj faris la unuan Esperanto-lumbildparoladon pri la historio de la horloĝoj.

Venis la jaro 1914 kaj la unua mondmilito. Sekvis multaj gravaj, ne agrablaj tentoj por fari ian horloĝekspozicion. Sed bedaŭrinde neniu havis monon. Profesoro kortega konsilanto Schuhmann intencis fondi horloĝmuzeon helpe de ŝtato. Oni bedaŭris, ke por nova muzeo mankis sufiĉe de mono. Kaj dum la jaro 1916 ĉiuj loĝantoj de mia loĝdomo ricevis la ordonon sekvontjare forlasi la loĝejojn.

Nun mi invitis la konatan verkistinon Helene Tušak-Lafité por rigardi mian horloĝĉambreton. La sinjorino venis kaj la 29-an de Oktobro 1916 ŝi skribis en la gazeto „Neues Wiener Tagblatt“ (Nova Viena Tagĵurnalo) tre interesan kaj amuzan felietonon pri „La senrifuĝeja kolektanto“. Tiu ĉi kun grandega intereso skribita artikolo atentigis multajn personojn, inter aliaj ankaŭ la tiaman urbestron de Vieno, doktoron Richard Weiskirchner, amikon de arto kaj metioj, kiun mi antaŭe jam kelkfoje instigis fondi horloĝmuzeon en Vieno per mia kolekto. Dum la intertraktadoj kun la komunumo Vieno mi ricevis inviton de la urbestro de Budapest, transporti mian kolekton al Budapest. La urbestro (Barczi) promesis dediĉi malnovan monaĥejon por la celoj de la horloĝmuzeo.

Intertempe per lumbildparoladoj en Urania la 7-an kaj 21-an de Januaro 1917 mi atentigis la publikon pri mia kolekto, pri kiuj poste fakgazetoj bonege raportis. La 1-an de Marto 1917 aperis en „Germana Esperantisto“ la tradukaĵo de la felietono de sinjorino Tušak, kiun esperantigis kolonelo Zwach.

Ankaŭ la horloĝistoj en Vieno vigliĝis kaj skribis en la fakgazeto de Novembro 1916, ke oni devu ĉion entrepreni, por ke mia kolekto restadu en Vieno.

La 4-an de Majo 1917 decidis la magistrato de Vieno fondi per mia kolekto horloĝmuzeon en la unua distrikto, en la malnova domo Schulhof n-ro 2, kaj min destini kiel estron de la muzeo. La Viena fajrobrigado transportis poste miajn kelkajn milojn da horloĝoj el mia horloĝĉambreto, kiu estis la ĉelo de la estonta muzeo en la por tio destinita domo.

Mia penso kaj laboro estis nun, kiel eble plej bone ekspozicii la horloĝojn laŭ ilia historia evoluo kaj laŭeble la kolekton pligrandigi kaj zorgi, ke la horloĝmuzeo fariĝu vera vidindaĵo de la urbo Vieno.

Mi fondis la „Societon de la Amikoj al la Horloĝmuzeo“, ricevis monon per ties helpo kaj helpe de la urbo Vieno. Feliĉa mi estis, kiam mi ricevis por la muzeo de la sinjoroj Skoda kaj Wetzler 300.000 kronojn por povi aĉeti la mondfaman kolekton de la baronino Ebner-Eschenbach konsistantan el 270 altvaloraj horloĝoj. Pro petskribo mi poste ricevis de la Vienaj bankoj 50.000 kronojn, por aĉeti alian grandan kolekton. Tiel la muzeo pligrandiĝis rilate al valoraj objektoj kaj spaco. Mi povis plenigi en la domo tri etaĝojn per tre interesaj horloĝoj ĉiuspecaj el preskaŭ ĉiuj landoj kaj tempoj.

La 30-an de Majo 1921 estis la oficiala malfermo de la horloĝmuzeo. De tiu tempo kaj ankaŭ iomete antaŭe mi gvidis la vizitantojn de la muzeo, klarigis kaj montris al ili kiel instruisto la plej interesajn horloĝojn kaj sistemojn. Pli ol 5000 gvidadojn mi faris kaj pli ol 53.000 personojn mi gvidis tra la ĉambroj de la muzeo dum la tridek

jaroj de la ekzistado ĝis la fermo dum la pasinta milito. Per kvindek lumbildparoladoj en diversaj institutoj kaj per kelkaj radioparoladoj mi multfoje atentigis la publikon pri la horloĝmuzeo de Vieno.

Dum la jaro 1943 mi bedaŭre devis fermi la muzeon. Pro la milito la muzeo perdis multajn tre valorajn objektojn. Nuntempe mi intense laboras por rekonstrui la muzeon kaj ĝin denove malfermi, se estos eble. dum la Majo 1948.

(Represo en germana lingvo ne estas permesata.)

La fondigo de la Theaterzeitung

de Adolf Bäuerle

Adolf Bäuerle (1786—1859) estis unu el la plej famkonataj verkistoj en Vieno dum la epoko de la aŭstria klasika literaturo. Li eldonis la „Wiener Theaterzeitung“ (Viena teatra gazeto) kaj skribis multajn verkojn (teatraĵojn, romanojn k. t. p.). La sekvanta tradukaĵo estas parto el la biografio de la aŭtoro.

Jam en la jaroj 1804 kaj 1805 eldoniĝis en Vieno „Monata revuo por amikoj al teatro“. Ĝi aperis kiel la nuna gazeto en la eldonejo de Wallishauser.

Mi estis redaktoro de ĉi tiu revuo. Sinjoro Wallishauser, la avo, ne donis monon al la kunlaborantoj, sed li pagis al mi mem pomonate por 16 paĝoj 7 guldenojn en papera mono. Mi estis tiam ankaŭ ŝtatoficisto ricevanta jare 300 guldenojn; mi ricevis do kune kun la monsumo de sinjoro Wallishauser monate 32 guldenojn!

Ne pli maljuna ol 19 jarojn kaj jam tiel granda salajro! — Mi ne konis pli riĉan viron ol min mem. — Mi d e v i s edziĝi — tiel mi pensis tiam — la tempo estas tre urĝa, ĉar se mi atendas nur unu jaron, neniu ino volos edzigi min. Kaj tia espero por mi estis abomena! — Mi serĉis kelkajn monatojn iun fianĉinon, mi serĉis idealon — mi ne trovis ĝin. Jes, mi konatiĝis kun vidvino 65 jaraĝa, sed ŝi ne estis tiel juna kiel mi deziris. Mia idealo estis knabino — mi devis konatiĝi kun knabino!

Fine mi trovis inon, kiun mi serĉis. Mia eldonisto Wallishauser festis balon. Kaj li invitis min.

Dum ĉi tiu balo mi trovis ĉarmegan inon, knabinon 17 jaraĝan. Mi dancis kun tiu anĝelo, mi dancis en la koron de la anĝelo. — Post la dua valso mi komencis mian amdeklaron per edzinigpromeso.

Mi fanfaronis per mia mono, per libera eniro en la banejon, en la balojn, en la bestĝardenon, en la teatrojn.

Al mia idealo plaĉis ĉi tiuj aferoj same kiel al mi. Ni estis kontentaj. Mankis nur — la konsento de niaj gepatroj. Ho ĝi ne gravis!

Matene post la balo mi kuris al mia eldonisto en lian librejon en Kohlmarkt (strato) por danki lin pro la grandega plezuro de la bal-invito.

„Komence mi ne volis inviti vin", deklaris al mi sinjoro Wallis-hauser, „sed ĉar mi intencis diri al vi hodiaŭ malplaĉindaĵon, mi volis doni al vi hieraŭ ankoraŭ iom da plaĉindaĵo".

Ĉu malplaĉindaĵon? Kaj al mi?

„Jes, vi ne estos plu la redaktoro de mia monata revuo. Sinjoro Hassaureck volas esti redaktoro. Sinjoro Hassaureck skribos la revuon tute senpage nur pro la honoro! Se vi volas redakti same kaj rezigni vian monon de 7 guldenoj monate, vi restos mia redaktoro!"

Mi rigardaĉis sinjoron Wallishauser.

Mi ne komprenis ĉi tiun aferon.

„Ĵus dum la balo mi promesis la edzinigon al la ĉarma Antonia. Ŝi akceptis ĝin. Kiel familia patro mi ne povos malakcepti 7 guldenojn monate! Sinjoro de Wallishauser, bonvolu esti homo! Mi ne volas havi edzecon sen infanoj!"

„Bonvolu edziĝi en la nomo de Dio! Sed pripensu ankaŭ, kian grandan sumon vi ŝparus kiel mia redaktoro! Via edzino volos viziti teatrojn. Per mia revuo vi ricevos ĉiu t a g e du biletojn por la du ŝtat-teatroj! Krome vi ricevos ĉiutage du biletojn por la teatro ĉe la Viena rivereto, por la teatroj en la Josephstadt kaj en la Leopoldstadt! La monon, kiun vi ŝparos tiamaniere mi kalkulas je 1000 guldenoj. 1000 guldenoj estas sufiĉaj por edzino kaj infanoj."

„Por mi ne! Alia redaktoro kalkulu kiel vi, sinjoro! Ĝis revido, sinjoro de Wallishauser! Ne unu linion mi redaktos plu!"

Li lasis foriri min. Mi atendis antaŭ lia librejo. Ĉi tiu viro d e v i s revoki min! Tiel mi pensis. Sonoris 10 — 11 — 12 — 13 horojn. Sinjoro Wallishauser iris hejmen por manĝi. Li fermigis la librejon. Li vidis min stari antaŭ lia librejo, sed li ne vokis min.

Senesperigite mi decidis ankaŭ iri hejmen kaj mi volis skribi al li leteron plenan de sopiroj, sed subite mi demandis min mem: ĉu mi bezonos eldoniston por gajni 7 guldenojn monate? — Mi mem volas eldoni ĵurnalon, mi volas fondi teatran gazeton, ne nur monatan revuon, kaj mi petskribos tuj al la registaro pro permeso!

Mi do petskribis al la tiama ministro grafo de Pergen, mi deklaris, ke mi jam estis redaktoro de la monata revuo por la amikoj al teatro, kaj jen, post nelonga tempo mi ricevis la permeson eldoni la gazeton. Kaj nun mi petskribis al la registaro pro permeso pri mia edziĝo. — La gepatroj de mi kaj de mia fianĉino jam jesis. Ni ambaŭ ja estis neplenaĝaj . . . Ankaŭ ĉi tiun permeson mi ricevis.

La 1. Julio 1806 matene je la sesa aperis la unua numero de la teatra gazeto kaj dekdu horojn poste, je la sesa vespere, mi edziĝis en la katedralo de Sankta Stefano.

Kun la unua numero de la gazeto en la mano mi vizitis la 2-an de Julio la ministron por danki lin pro la eldonpermeso.

Kiam la ministro vidis min kaj aŭdis, kion mi volis, li demandis: Kial ne vizitis min via patro mem kaj kial li sendis sian filon? Ĉu via patro estas malsana?

„Ĉu mia patro?“ mi respondis. „Mi mem volas danki al via ekscelenca moŝto pro la permeso!“

„Ho, estas neeble, ke mi permesis al vi, al junuleto, la eldonon de gazeto!“

„Certe, via ekscelenca moŝto, vi permesis al mi la eldonon.“

„Sed vi estas neplenaĝa junuleto!“

„Via ekscelenca moŝto,“ mi respondis, „mi estas viro, estas edzo kaj post naŭ monatoj mi esperas, ke mi estos ankaŭ patro!“ — Lia ekscelenca moŝto malespere kapturnis kaj lasis foriri min.

En Januaro 1807 ne plu ekzistis la monata revuo por amikoj al teatro. Ĝi estis neebla post la fondiĝo de mia gazeto.

Esperantigis d-ro E. J. Görlich.

La saketo

La somera pluveto ĉesis kaj la malseka herbaĵo de la parko ree baniĝis en sunradioj. Post malmultaj minutoj aperis homoj kvazaŭ per magio, kie antaŭe montriĝis tute dezerta parko. Laŭlonge de gruza vojeto venis du junulinoj de la ŝirmdonaj arboj, sub kiujn ili rifuĝis pro la pluvado. Alveninte la sunbanatan ebenaĵon, ili kun senvorta interkonsento direktis sin al benko ĉe la vojflanko.

„Ugh“, kriis nun unu, „preskaŭ mi sidiĝis sur ĝin!“

„Sur kion?“ scivoleme demandis la alia.

„Sur ĉi tiun aĉaĵon“ ŝi diris kaj montris per la fingro al malnova, eluzita tabaksaketo, kiu kuŝis sur la benko. Ĝi ja estis malbela, tre malnova kaj iom malseka pro la ĵus pasinta pluveto, tamen ĝi vere ne meritis tian preskaŭ histerian sintenon de la junulino.

„Ne tuŝu ĝin!“ diris la pli aĝa kiam la alia alproksimigis esploreman fingron, „vi ja ne scias al kia malpura vagulo ĝi apartenas.“

„Neniu povus posedi tian aĉaĵon“ respondis la pli juna.

„Do, forpuŝu ĝin de sur la benko!“ — kaj obea al siaj propraj vortoj ŝi frapetis la saketon kaj jen ĝi falis sur la vojeton en malgrandan lageton el pluvakvo.

La saketo ja vere estis mizera objekto kaj oni povus senkulpigi la junulinojn pro ilia sento de abomeno, eĉ se oni ne tiel forte esprimus

tion. Sed per pli atenta rigardo oni ekscius, ke, kvankam ĝi estas tre malnova, tamen iufoje ĝi certe estis bela saketo el bonkvalita ledo. Fakte, siatempe la saketo estis multekosta kaj certe ne de speco, ke oni supozus, ke tian tabaksaketon posedus vagulo ĉu pura aŭ malpura.

Efektive ĝia posedanto ne estis vagulo, sed metiisto, kiun antaŭ dek jaroj trafis grava akcidento, kiu malebligis al li pluan laboron en sia metio. La firmo, dunginta lin, tute ne konfesis respondecon sub la preteksto de kulpa malzorgo de la laboristo, tamen, ĉar li jam estis kvindeknaŭ-jara kaj laboris por la firmo dum pli ol kvardek jaroj, ĝi kompleze donacis al li tre malgrandan pension, per kiu la maljunulo iamaniere subtenis sian vivon en la lastaj dek jaroj.

Je la tempo de lia eksigo el la firmo kelkaj el liaj kunlaborantoj faris malgrandan monkolekton kaj prezentis poste al li tabaksaketon kun funto da tabako. Estis bonega saketo, multe pli kosta ol iu ajn antaŭe de li posedita kaj ĝi fariĝis por li dum la multaj jaroj speco de fetiĉo. Ĉu pro tio, ĉar la saketo prezentis por li konkretan memoraĵon pri dumviva laborado, ĉu ĉar ĝi esprimis plenan bonkorecon de amataj kunuloj aŭ ĉu pro alia kaŭzo, tion oni ne povas diri; certe ankaŭ ne li mem. Restas nur la klarigo, ke li tre alte taksis ĝin kaj dum pasis la jaroj eĉ pli kaj pli tro valorigis la ĉiam malnoviĝantan saketon. Kaj nun per iu hazardo li perdis ĝin kaj tie lia ŝatata memoraĵo kuŝis en la lageto.

Venis esplorema hundo, kiu la saketon atentis, priflaris, hezitis kaj — preteriris. Sekvis patrino kun infanĉareto kaj malgranda knabo paŝis je ŝia flanko. Rado de la ĉareto transpasis la saketon kun ekskuo kaj la knabeto malsupren rigardante, emis eklevi ĝin.

„Ne tuŝu! Malpura!“ diris la patrino antaŭen ŝovante la etulon. Alproksimiĝis viro, kiu per flankenpuŝo ŝovis la saketon tiel forte al la vojbordo, ke ĝi preskaŭ atingis fluilkradon kun neordinare vastaj interspacoj. Plian futon pli proksimen al la krado kaj la saketo trafus en la drenilon kaj malaperus por ĉiam.

Jen aperis maljuna viro, ege rapidanta. Pli ĝuste li penis rapidi, kvankam li efektive alproksimiĝis malpli rapide ol la viro, kiu piedpuŝis la saketon al la krado. Kun ŝanceliĝaj piedoj li alvenis la benkon kaj avide rigardis sur ĝin. Kun manmovo, kvazaŭ li celis la ĉapelon, li alparolis la junulinojn per alttona, iom spirmanka voĉo: „Pardonu min, ĉu vi vidis eble mian tabaksaketon?“

La knabinoj rigardis unu la alian kaj poste mallaŭte ili ekridis. Ili ja ne intencis esti malĝentilaj, sed ili surpriziĝis kaj tute ne komprenis la situacion. Tiaokaze ekrido estis ilia kutima reago. Ili ne rekonis la „aĉaĵon“ kiel tabaksaketon kaj tial la pliaĝa fine respondis al la maljunulo per konciza „Ne!“

„Mi havis ĝin, kiam mi sidis ĉi tie sur la benko“, li diris „kaj nun ĝi estas for, mia malgranda saketo el tre bona ledo,“ li daŭrigis malvigle serĉante sub la benko. Je la vorto „ledo“ la pli juna knabino eligis akran soneton, ian ekridon kaj demandis: „Ĉu tio ĝi estas?“ montrante per la fingro la saketon kuŝantan apud la fluilkrado. La maljunulo turnis sin en la montritan direkton kaj subite en liaj okuloj ekbrilis ĝojego: „Ho, jes, jes, tio ĝi estas.“ Rapide li paŝis al la saketo kaj eklevis ĝin kun tiel evidenta dorloteco, ke denove ekridis ambaŭ junulinoj, kaj ĉi tiun fojon tutlaŭte. La maljuna viro turnis sin al ili kaj ilia ridado tuj ĉesis kvazaŭ ili atendus riproĉon de li. Sed kontraŭe, li alproksimiĝis kun vizaĝo tutrida kaj brilaj okuloj kaj diris: „Ho, dankon, dankon! Vi ja ne scias kiom ĉi tiu saketo signifas por mi, tial mi ne sufiĉe povas danki al vi. Dankon!“

Denova ekrido de la knabinoj sekvis tiujn vortojn, sed ĉifoje en tono pli natura kaj amikeca. La mieno kaj vortoj de la maljunulo ja estis ridindaj, kaj ankaŭ ridado estis taŭga esprimo antaŭ tia ĝojo, kiu tiel evidente superfluis lin.

Kiam la maljuna laboristo malproksimiĝis returnen laŭ la vojeto kaj la knabinoj konsideris la aferon, ili trian fojon ekridis. Ree ĝi estis ridado de malkompreno, sed tamen kun nova nuanco iom plorema.

T. K. Slade.

Zamenhofa ahrostikono

(Rudolf Steiner)

Laŭdu ĉiam ni la noblan viron,
Urĝas de la verko lia la proklam'!
Destinata estu lia granda am',
Vere diskonigi pacan diron
Inter la popoloj kaj komprenon.
Graco pereigu la venenon!

Zorgu, ke honoroj kaj estimoj
Akompane venku sur la tero!
Malbenita de malam' eĉ ero,
Enplantita en popolaj limoj!
Nin kunligu sento de l' homeco,
Harmoni' elfluu el la kor',
Ondo de eterna di-vereco
Firma pelu fi-mallumon for!

Libere tradukis F. Menacher.

La fruktarbeto

Tagmeza paŭzo en la laborejo. La laboristoj manĝas sidante ĉe la labortabloj. Ladaj manĝujoj je diversaj grandeco kaj koloro staras antaŭ la manĝantoj. Unu inter ili estas posedanto de ĝardeneto; li prenas el la aktujo kelkajn abrikotojn kiel aldonon al sia malgrasa manĝaĵo.

Laboristo, proksimume 65 jara kun la nomo Madner Johano, sidanta vid-al-vide, levas sian grizan kapon kaj alparolas la posedanton de la ĝardeneto: „Ruĉjo, fruktarbeto kreis bazon por epizodo en mia junaĝo, kiu ankoraŭ hodiaŭ ŝvebas antaŭ miaj okuloj. Ekmemorante pri ĝi, mi ĉiam denove travivas ĝin.“ La alparolita Ruĉjo kaj ankaŭ la aliaj petis Madner rakonti tiun epizodon.

Do, li komencis: „Mi estis je tiu tempo 14 jara knabo. Mia patro posedis apud nia dometo ankaŭ ĝardenon. Iutage li alportis el la arbaro sovaĝe kreskintan fruktarbeton kaj enplantinte ĝin li volis ĝin flegi plu. Mi volas antaŭdiri, ke en tiama tempo ne ekzistis ebleco, aĉeti jam greftitajn arbetojn. Ĉiu kampulo faris tion mem. Mia instruisto estis tiurilate tre sperta homo kaj montris al ni knaboj bilde kaj praktike la greftadon.

Mi estis entuziasmigita pro liaj klarigoj. La sopiro al memstara ago, posta vartado de la arbeto, kune kun interna scivolo miksita kun espero al progreso, ĉio ĉi incitis mian animon, pelante min al decido praktike sen iu ajn protekto aŭ gvido elprovi tian laboron montritan de la instruisto.

Kiel objekton por tiu operacio mi en mia infana naiveco ĝuste elserĉis la arbeton enplantitan de mia patro pro ĝia bela rekta kresko. Pri patraj intencoj koncernantaj tiun arbeton mi eĉ nenion sciis.

Estis printempo; do, konvena tempo por tiu operacio.

Mi kaŝe iris en la najbaran ĝardenon, kie kreskadis arboj portantaj belajn fruktojn; tie mi detranĉis kelkajn branĉetojn de diversaj fruktspecoj kaj tuj komencis la laboron. Sed mi ne kontentiĝis pri unu speco; mi detranĉis la pinton kaj greftis tri specojn sur la trunkon.

Sed, ho ve! La sekvojn vi ne povos imagi al vi. La patro, ekrimarkinte la arbeton kun detranĉita pinto, sur kiu estis fiksitaj tri pecetoj da branĉetaro, treege ekscitiĝis. Li prenis min je la nuko, trenis min en la ĝardenon kriegante: „Jen, vidu vi netaŭgulo, kion vi faris! Vi tute kripligis la arbeton!“

Ruĝiĝinte en vizaĝo, li batis min senkompate. Mia vekriado, aŭdebla en la tuta vilaĝo, alarmis la najbarojn, kiuj alkriegis mian patron: „Ĉesu do, vi freneziĝinta homo! Vi mortbatos la infanon! Ĉu vi volas fini vian vivon en karcero?“ Tiuj ĉi voĉoj rekonsciigis mian patron; li ĉesis bategi. Mia korpo estis kovrita de bluaj ŝvelaĵoj. Mia nazo havis

aspekton de misforma kukumo kaj bela blua ringo ornamis mian dekstran okulon.

Baldaŭ mi iĝis lernanto de lignaĵisto.

Jaroj pasis. Reveninte de la metia eksterlanda migrado hejmen, mi tuj rimarkis en la ĝardeno belkreskan fruktarbon. Mi konstatis, ke mia tiama operacio tute sukcesis. Nome, la arbo portis tri diversspecajn fruktojn. Unu speco el ili estis grandaj, preskaŭ diafanaj, belaj prunoj kovritaj unuflanke de ruĝaj punktetoj, la dua speco estis belaj bluaj prunoj kaj la tria parto estis grandaj nigraj ĉerizoj.

Oni rakontis al mi, ke la kamparanoj el la ĉirkaŭaĵo venante tien ĉi, ĉiam admiras tiun vidindaĵon. Sed kiu estis la plej granda admiranto? La patro mem. Oni ofte diris al li la sekvantan frazon kiam li kapskuante staradis antaŭ la arbo: „Kaj pro tio vi bategis vian infanon?“

„La recevitaj bategoj kaj doloro estis sufiĉe rekompencitaj per tiu sukceso“, finis la laboristo sian rakonton.

La unuhora tagmeza paŭzo finiĝis. La laboristoj disiris, ĉiu al sia laborloko.

Johann Kral.

Sur mia mont'

Hugo Kraus

Sur mia mont' nek vent', nenio
Ŝanĉelas min; kun forta star'
Ĉirkaŭas min plej bona ĉio,
Firmigas min kiras' kaj bar'.

Sed se mi logis min malpinten,
Kie l'amas' sen hont' kaj blinde
Nur kredas pri ĉap' kaj mantel' —
Jen pri reĝeco seniĝinte
Mi perdas min en la malhel'.

Kaj se, pri mi ne rezignante,
Sur mian monton, indignante,
Rifuĝis mi al mi kaj Di' —
Kontraŭ atencoj do konstante
Defendopreta restu mi . . .

Kia traduko estas bona?

Tiu ĉi demando ofte okupas la esperantistojn. Kiel ni do agu, por atingi bonan tradukon?

Faritaj spertoj evidentigas, ke troa apogo al la originalo malkaŝas, ke temas pri traduko. Ĉu estas aprobinde, ke traduko estu rimarkebla?

Mi diras: Ne! Bona traduko ne prezentu sin kiel traduko, sed aspektu ĉiamaniere kvazaŭ ĝi estus originala.

Konsiderante tiun ĉi postulon, ni jam venas pli proksime al la kerno de la problemo antaŭ ni troviĝanta.

Franco ekzemple tradukas anglan verkon. Uzante la anglan, tiu franco restas franco. Jen fakto nefordiskutebla. Konscie aŭ nekonscie li francigas la verkon; ĝi ja estas destinota por francoj, ne por angloj. Unuflanke li kompreneble klopodas, konservadi la anglan spiriton, la anglan medion, aliflanke li ne povas eviti, montri sin kiel tiu, kiu li estas kaj restas: franco. La legantaro ne atendas ion alian.

Kaj kion faras esperantisto? Ankaŭ li ne povas elturni sin el sia haŭto kaj ne povas kaŝi, ke li estas italo, svedo, hungaro aŭ hispano. Tamen: la esperantisto sin volas komprenigi al ĉiu esperantisto en la mondo. Tio devigas lin al lingvo de ĉiu naciano komprenebla. Naciaj parolturnoj — germanismoj, ĉeĥismoj, polismoj — por li ne ekzistu; ili ne povas aparteni al lia esprimilaro.

La formulo por bona traduko do estas: Laŭeble veni proksime al la originalo, sed eviti ĉian pezecon kaŭze de la tradukado. Traduko aspektu kiel originalo — vere ne facila tasko.

St. Z.

Diagnozo el malproksimo

Tri medicinstudentoj de la kvara semestro iutage vagadis dum la vespera krepusko tra silenta strato. Kaptitaj per debatoj pri diversaj medicinaj temoj de komuna graveco ili ekvidis malproksime antaŭ si viron treniĝantan sur la trotuaro.

Lia marŝmaniero ŝajnis stranga, ĉar li tute ne moviĝis rekten, sed kvazaŭ piedfrapis unu kruron sur la alian. Dum tio li unue levis iomete la dekstran piedon por meti ĝin singarde antaŭen. Poste li eklevis la alian kruron, ĵetante ĝin flanken kvazaŭ intencante forpuŝi ĝin, por fine per subita puŝo ĝin reportante starigi apud la dekstran. Je tio ankaŭ lia dorso ekstreme moviĝis kune kun la brakoj. Tiel li nur tre malrapide iris antaŭen kaj la tri studentoj jam baldaŭ alproksimiĝis al li.

„Tiu ĉi viro certe suferas reŭmatismon“ juĝis la unua.

„Jes, li certe jam havis ĝin iufoje“ diris la dua, „sed nun li jam longdaŭre malsanas je isĥiaso“.

„Nu, vi ne havas ĝustan percepton“ ridis la tria. „Vi nomu min medicina malsaĝulo, se li ne havas gravan artriton!“

Ili do ne povis interkonsenti. La unuaj ambaŭ konfesis, ke eble sin prezentas artika reŭmatismo aŭ precipe grava kazo de iŝĥiaso, kiam la tria firme kaj forte ĵuris pri artrito. Fine ili decidis demandi la viron mem.

„Bonvolu pardoni la ĝenon“ diris la unua ĝentile deprenante sian ĉapelon. „Ni estas medicinaj studentoj ĵus disputintaj pri via malsano. Mi mem opinias, ke via bedaŭrinda malsano estas reŭmatismo, kontraŭe miaj kolegoj diagnozis iŝĥiason aŭ artriton.“

„Kia diferenco do ekzistas?“ la viro demandis, ŝajne eĉ ne scianta kian malsanon li havas.

„Nu,“ diris la dua, „ tio ja estas tute simpla. Pro reŭmatismo vi suferas terurajn dolorojn en la muskoloj aŭ artikoj, aŭ eĉ en ambaŭ, dum ĉiaj movadoj de la koncernaj korpopartoj. Je iŝĥiaso vi suferas la samajn dolorojn eĉ ankoraŭ pli fortajn kaj plue vi havas la impreson kvazaŭ estus ardflua plumbo enverŝita en la artikojn. Kaj se tiam iu homo venas kaj trioble forte surfrapas la terure dolorantajn punktojn, tiam ĝi estas artrito!“

La viro pripensis momenton kaj poste kapskuante respondis: „Ne“, li diris, „tio ne estas mia malsano. Mi nur malstreĉis miajn ŝelkojn, ĉar mi ne povis reguli tiujn kondamnitajn ilojn tra mia dika palto!“

C. F. Ahlgrimm.

Sciencaj Glitlumoj

La plej granda energio-produktanto estas la suno. Ĉiu kvadratcentimetro de ĝia surfaco kugloforma radias en la kosmon energion de 8 ĉevalfortoj. Laŭ la diametro la suno estas 140 oble pli granda ol la tero. La jarproduktado de energio do estas ĉirkau 350 septilionoj da kilovathoroj. Feliĉe la tero ricevas de tio nur la dumiliardonan parton, alie ĉia vivo sur ĝi estus forbruligata. Oni kalkulis, ke jare alvenas sur la teron proksimume 150 kvadrilionoj da kilovathoroj de la suna energio.

*

La astronomoj taksas la nombron de spiralnebuloj en la kosmo je 100 milionoj. La distancego de unu al alia estas meznombre 2 milionoj da lumjaroj.

La spiralnubo en la planedo Andromedo estas kvazaŭ mondinsulo ŝvebanta en la kosmo en distancego de 700.000 lumjaroj. En la astronomio unu lumjaro signifas distancon de 10 bilionoj da kilometroj.

La lingvan Babilon-on en la mondo elmontras esplorado de amerika universitato, lau kiu nuntempe ekzistas entute 2800 vivantaj lingvoj.

Sed la tutsumo de ĉiuj ĝis nun konataj mortaj kaj vivantaj lingvoj estas preskau duoble pli granda.

La lastaj nombradoj por mez = kaj okcidenteŭropo rezultigis 56 lingvojn sen la multaj idiomoj kaj la multaj lingvoj de la Sovetunio. En Hindujo ekzistas ĉirkau 200 diversaj lingvoj. La Biblio estas ĝis nun tradukita en 1000 lingvojn.

Reaktivigo de paralizitaj nervocentroj per trahaŭta traktado per spirfermentoj

De d-ro Otto Zajicek, Wien

Diversspecaj paralizoj, kiel poliomjelitoj, multoblaj sklerozoj, apopleksioj, mjelitoj k. s., kiuj dum jaroj kaj jardekoj daŭris senŝanĝe, estis ĝis nun konsideritaj kiel ne kuraceblaj, ĉar oni supozis, ke la nervocentroj estas detruitaj.

Sed laŭ la rezultoj de miaj esploroj kaj eksperimentoj tio tute ne ĉiam, eble eĉ pli ofte ne estas vera. La nervocentroj ofte ne estas detruitaj, sed nur malfunkciigitaj, pro manko de certaj spirfermentoj, kiuj devas ĉeesti, por ke tiuj povu ĝuste funkcii pere de la oksigeno de l'aero.

Miaj esploroj pri produktaĵoj el freŝaj glandoj kondukis min en longjaraj eksperimentoj al la eltrovo, ke la fermentoj mankantaj en la nervoĉeloj estas plej bone enporteblaj tra la haŭto per simpla enfroto de koncentritaj fermentŝmiraĵoj senpere en la sangcirkulon kaj per tio en la nervocentrojn.

Al tiu ĉi vojo mi estis alkondukita per jenaj ekkonoj: 1) la studo de la teorio pri la ĉelspirado, en kiu iel gravas fermentoj, hormonoj kaj vitaminoj, 2) eltrovo de la rumana neŭrologo Marinescu, laŭ kiu la poliomjelito detruas la gravajn spirfermentojn („oksidazojn") en la antaŭaj kornoj de la mjelo (spina medolo), 3) la fakto, ke la mezepokaj kuracistoj konis ĉ. 10 ŝmiraĵojn kontraŭ paralizo, dum la moderna medicino sciis ĝis nun neniun.

Per tiaj ideoj kaj eksperimentoj mi sukcesis produkti ŝmiraĵon, kiu enhavas la spirfermentojn en maksimuma koncentreco kaj penetrigas ilin pere de certaj lipoidaĵoj preskaŭ plene kaj nekredeble rapide tra la haŭto en la sangtubaron. Ĉar tiu ŝmiraĵo enhavas precipe la oksidazojn tre koncentritajn kaj plene efikemajn, mi elektis por tiu kuracmetodo la nomon „oksidaza kuraco" kaj nomis la kuracilon „oksidaza ŝmiraĵo".

Per la oksidazaj fermentŝmiraĵoj, fabrikitaj laŭ miaj esploroj, oni povas preskaŭ ĉiam, k i a m la nervocentroj n e estas p l e n e d e t r u i t a j, forigi paralizojn, eĉ, se ili daŭris jam dum jaroj, ofte ne kredeble rapide, aŭ almenaŭ konsiderinde plibonigi la staton. La rapida, ofte mirinda sukceso de tiu ĉi enfroto evidentiĝas jam en ĝia tuj videbla

efiko al la sangtubetoj de la haŭto, precipe ĉe tiel nomitaj cianozaj membroj (paralizitaj, bluiĝintaj), ekzemple post apopleksio aŭ poliomjelito, ĉar tuj post la enfroto la blua membro fariĝas blanka kaj post kelkaj minutoj iĝas sane ruĝa. Tiu ĉi fenomeno etendiĝas ankaŭ tre rapide de la frotloko, ekzemple de unu gambo, al la alia, ne frotita gambo.

La sukcesoj de mia trahaŭta oksidaza kuraco estas pruvitaj per multaj aŭtentikaj observoj. Ekzemple lamiĝintoj pro apopleksio, post kelkaj enfrotoj rekapablis movi la membrojn, infanoj malsaniĝintaj je poliomjelito, povis movi la paralizitajn membrojn, unu laboristo, kiu estis jam de multaj jaroj malsana de multobla sklerozo, tute resaniĝis kaj estis eĉ deklarita kiel taŭga por militservo, paralizitaj militviktimoj reakiris sian movkapablon, malbonaŭdintoj (pro difektoj de la nervo akustika) komencis denove aŭdi . . . k. t. p. k. t. p.

Per tiu metodo mi pruvis, ke ankaŭ la p a r a l i z o j a p a r t e n a s al la „m a l s a n o j d e m a n k o“(manko de certaj vivmaterioj); kiuj sekve estas kuraceblaj per alkonduko de la mankantaj materioj.

La aplikebleco de tiu ĉi nova kuracmetodo estas grandega kaj malfermas tute novajn perspektivojn, precipe en la kuracado de la militinvalidoj. Konsiderante la observitajn saniĝojn aŭ pliboniĝojn de paralizoj post mjeldifektaj pafvundoj, la ministerio por saneco en Dresden sendis komisionon por esplori la metodon al la kuracejo Ebersbach en Saksujo. La komisiono rekonis la metodon kiel science pruvitan kaj aprobis pri ĝi ordan takson en la nova kuracista tarifo de la malsanulasekuroj. Ankaŭ en Svisujo la oksidaza kuracado de paralizoj estas jam enkondukita de gravaj sanatorioj. Universitataj klinikoj daŭre sendas pacientojn al la eltrovinto, kaj per praktikaj elmontroj konvinkiĝas pli kaj pli pri la taŭgeco kaj graveco de tiu metodo.

Bedaŭrinde la ŝmiraĵo ne estas konservebla aŭ transportebla, sed uzebla nur freŝa tuj post la fabrikiĝo. Tial oni devas fabriki la ŝmiraĵon en ĉiu lando mem kaj uzi ĝin kiel eble plej rapide en centraj institutoj (sanatorioj, klinikoj k. t. p.). Interesitaj kuracistoj bonvolu turni sin al la eltrovinto, kiu instruas la metodon persone. (Akceptas alskribojn en Esperanto kaj lingvoj angla, franca kaj germana.) Financistoj, kiuj disponas pri taŭgaj laboratorioj, kaj interesiĝas je la fabrikado de tiu ĉi kuracilo, nomu rajtigitan kuraciston, por ke li ellernu kaj enuzigu la manierojn de la produktado kaj aplikado. Ĉiuj interesitoj (paralizitoj, kuracistoj, malsanulejoj, sanatorioj, malsanulasekuraj institutoj kaj speciale asocioj por la prizorgado de militinvalidoj) ricevos laŭpete pli detalajn informojn de A ŭ s t r i a E s p e r a n t o-S e r v o, Wien I., Neutorgasse 9. —

Represo kaj publikigo en naciaj lingvoj deziratajn. (Trad. Pebe.)

Raportetoj

Okazis en la jaro 1947

La franca parlamenta deputito M o n g a b e l, reprezentanto de afrika franca regiono, antaŭ kelkaj monatoj veturis al Usono, la sidejo de UNO, por tie reprezenti la dezirojn de siaj samlandanoj. Sed la tuta afero havis malfeliĉon: La franca parlamenta deputito ne povis trovi ĉambron en hotelo, ĉar li estis — negro. (Feliĉe, ke la Hitlera rasteorio estis kondamnita de la tuta mondo.)

Butero — nekonata

Antaŭ kelkaj monatoj oni publikigis en Tokio, ke al la loĝantaro estu disdonata butero. Tio konsternis la niponajn dommastrinojn, ĉar butero estis tute nekonata varo inter la popolaj rondoj de Niponio. Ĉe la disdonejoj la virinoj aperis kun korboj, sakoj aŭ boteloj, laŭ la imago kiel aspektus tia stranga nutraĵo. Unu el la sinjorinoj eĉ klarigis, ke ŝi certe scias, ke butero estas speco de ligno. Sed la konfuzo ankaŭ restis post la disdonado. Finfine dommastrino havis la ideon kuiri la buteron kaj tiamaniere malkovris, ke la butero aliiĝas je „oleo". Kelkajn horojn poste ĉiuj virinoj de la najbareco estis okupitaj „produkti oleon" el la butero. (Pro manko de butero en Eŭropo en la nuntempa postmilita periodo eble ankaŭ nia juna generacio agus tiamaniere.)

Bilanco pri la milito

El la en Svisujo aperinta libro „La fin des hostilités" de J. K. Schiels, ni citas: 59 ŝtatoj partoprenis la militon. 100 milionoj da homoj surhavis uniformojn. 10 mil. soldatoj mortis ĉiutage. 15 milionoj da soldatoj mortis kaj 13 milionoj da civitanoj. Ĉi tiun nombron de ĉirkaŭ 30 milionoj da kadavroj ni ankoraŭ devas pligrandigi per minimume 10 milionoj da kripligitoj, blinduloj, frenezuloj, kaj suferuloj pro ne sanigeblaj malsanoj. Krom tio oni taksas la nombron da vidvinoj kaj georfoj je 20 milionoj, kaj plue ankoraŭ mortos ĉirkaŭ 12 milionoj da homoj malsatiĝintaj kaj grave vunditaj. Entute Schiels taksas la nombron da militviktimoj je ĉirkaŭ 100 milionoj! Observante la bolantan, ĉiam pli ĥaosiĝantan mondon, ni tioman fojon surtabligas la demandon „Ĉu tiuj 100 milionoj v a n e forfalis?" Kaj ni scias, kun granda certeco, ke la respondo estos jesa, se ne baldaŭeble kaj decidige ŝanĝiĝos la ekonomia strukturo!

El Internacia Asocio Bellamy.

ESPERANTO-MONDADO en Aŭstrio

AEF kore gratulis al malnovaj meritplenaj samideanoj

Okaze de la 77-jara naskiĝfesto de la iama direktoro de la ŝtata ekzamenkomisiono por Esperanto, s-ano kortega konsilisto d-ro F. Wollmann, la estraro de AEF esprimis al li siajn korajn gratulojn.

Same transdonis la centra estraro siajn bondezirojn al s-ano kortega konsilisto Hugo Steiner, direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, kiu festis sian 70-jaran naskiĝtagon.

La Landestraroj de AEF en Aŭstrio

Laŭ § 13 de la AEF-statuto estas necese, ke en ĉiuj federaciaj landoj funkciu landorganizo, kiu laŭeble plenumu la organizajn aferojn en la respektiva lando. Gis la definitiva reguligo, la centra estraro komisiis jenajn grupojn, ke ili provizore transprenu la agadon de AEF-landestraro:

Wien Viena Esperantista Delegitaro (VED), Wien.
Niederösterreich E-grupo „Arbara Regiono", Horn.
Oberösterreich E-grupo „Estonteco", Linz.
Salzburg E-grupo „Verda Stelo". Salzburg.
Steiermark E-grupo „Unueco" Graz.
Tirol E-grupo Kufstein, Kufstein.
Kärnten E-grupo „Paco", Klagenfurt.
Vorarlberg E-grupo Hard, Hard, a. B.

Ĉiuj grupoj en la respektiva lando interrilatu pri organizaj aferoj kun tiu grupo, kiu provizore prizorgas la funkcion de landestraro.

Aforismoj

La patriotismo ne estas la malamo kontraŭ aliaj popoloj, sed la amo al la propra popolo. Rosegger.

Urbestro de Budapest favoras Esperanton

A Szekesfövaros polgarmestere
3228/1947, pmH, sz
Budapest, 25. XI. 1947

Tre estimata sinjoro konsilisto!

Koran dankon pro via letero de 30. Oktobro 1947. Mi dankas ankaŭ pro via gratulo, ke mi laboris por la intereso de Esperanto. Mi trovas, ke tre bela kaj bona estas via ideo, komune agi, precipe por la intereso de la najbareco. Ankaŭ tre bona ideo estas la vizito de reprezentanto kaj priparolado de ĉio necesa, ĉar tiu ĉi komuna laboro estas argumentita de alta intereso. Tial ni ĝojis, kiam via urbestro, sinjoro Körner honoris nin per sia vizito, kaj ni estas dankemaj pro la afabla akceptado, kion ricevis nia vicurbestro sinjoro Petro Bechtler estante en Wien. Ni esperas, ke se ni aranĝos denove tiajn reciprokajn intervizitadojn, tio plifortigos la bonajn interrilatojn, kiuj estas inter vi kaj ni.

Kun kora saluto subskribo:
Jozefo Bognàr, urbestro.

Al Dr. Maximilian Führing
sekcia konsilisto kaj direktoro de la „ŝtata Esperanto-Ekzamen-Komisiono de la Instru-Ministerio", Wien.

Sinceran dankon al s-ano C. J. Timmerman (Holando)

En numero 10—12/47 de nia Revuo ni esprimis la dankon de multaj aŭstriaj ges-anoj, kiuj ricevis nutraĵpaketojn de bonkoraj holandaj Esperantistoj pro alvoko en „Heroldo de Esperanto".

Hodiaŭ ni aldonas la komunikon, ke s-ano C. J. Timmerman, en Den Helder, Holando, multe klopodis kaj ankoraŭ klopodas, por ke holandaj Esperantistoj adoptu Vienan Esperantistan

familion kaj subtenu ĝin laŭpove. Ankaŭ tiu ĉi vere samideana agado de la nomita s-ano alportis al multaj Vienaj geesperantistoj valorajn nutraĵpaketojn el Holando.

Pro tio ne nur al tiuj nenomitaj donacintoj, sed speciale al la iniciatinto de tiu ĉi helpservo, s-ano C. J. Timmerman, ni elkore esprimas nian plej sinceran dankon. — La estraro de AEF.

Ni tre bedaŭras tion...

La ĝenerala direkcio de la Aŭstria Poŝt- kaj Telegrafa Administracio per dekreto de 29. 12. 1947, Z. 40349/1947, komunikis, ke la peto de Aŭstria Esperantista Federacio pri allaso de la lingvo Esperanto en la internacia telegrafa kaj telefona interkomunikado ne povis esti akceptata.

Rimarkigo: Ni tre bedaŭras tion, sed ni bone scias, ke ĉi tiu refuzo ne okazis laŭvole de la ŝtata poŝtadministracio, kies ĝen. direktoro, d-ro Karl Dworschak, estas kiel konate, varma amiko al Esperanto, sed la malakcepto okazis per la Aliancana Konsilantaro, kiu findecidas pri ĉiuj gravaj administraj aŭ leĝaj aferoj en Aŭstrio. Tamen ni estas certaj, ke post la v e r a liberigo de Aŭstrio ĉi tiu afero ŝanĝiĝos pozitive. — La redakcio.

Viena Esperantista Delegitaro (VED)

Kunsido 7. 1. 1948. — La diversaj grupoj raportis pri novaranĝitaj E-kursoj. Aranĝis „Verda Stelo" kurson en la Popola Altlernejo, Wien V.; Poŝtista E-fakgrupo: 2 kursoj por progresintoj; Fervojista E-fakgrupo: 2 kursoj; „Danubio": 1 kurso; „Harmonio": 1 porkomencanta- kaj 1 porprogresinta kursoj; s-ano Bouché anoncis porinfanan E-kurson en la societo de la „Infanamikoj" en la XII. distrikto.

Afergvidanto de VED, s-ano Cech, raportis pri la invito de la E-grupo Kufstein al Vienaj E-istoj partopreni ĝian festeton la 2. 1. 48. Bedaŭrinde pro diversaj kialoj neniu povis veturi al Kufstein.

Estro de VED, s-ano L. Sager, raportis, ke la Centro de AEF ne estas tute kontenta pri la agado de la Delegitaro kaj koncize priparolis la plej proksime farotajn taskojn. Li ankaŭ memorigis la delegitojn, ke ili atente tralegu la gazetaron kaj trovinte notojn pri- aŭ por-Esperantajn, ili tuj sendu tiujn al la Centro aŭ faru almenaŭ precizajn kopiojn. — La grupkasistoj laŭeble tuj finkalkulu la kotizojn de la grupoj por VED.

S-ano Vokal atentigis, ke la membroj jam nun ekŝparu monon por eventuala vizito de la diversaj landaj kaj internaciaj E-kongresoj. Ankaŭ la bezono de pasportoj devas esti ĝustatempe anoncata kaj li donis klarigojn, kiamaniere oni povas akiri pasporton.

S-ano Cech referis pri la projekto de okazigo de Viena E-Konferenco en Marto ĉj. Por la preparaj laboroj estis elektata komitato. — Poste ankoraŭ parolis la s-anoj Zink, Werner, Cech, Bouché kaj Braun pri diversaj aktualaj aferoj.

Zamenhofa festo de la Viena Delegitaro

Gi okazis la 14. 12. 1947 en la sindikata salonego, Wien VIII., Albertgasse 35 kun varia programo. Salutis la multnombre aperintan Esperantistaron s-no E. Sager, festparolis pri „60 jaroj n Esperanto" prezidanto P. Glüxmann, laŭtlegis vortojn de Zamenhof s-ano E. Vokal, recitis poemon s-ano L. Bartek kaj beligis la programon per artaj muzikaĵoj la mandolina kvarteto de la s-ano Bouche. Ĉiui kunagintoj rikoltis riĉan aplaŭdon. Kelkaj eminentuloj honoris la feston per sia ĉeesto.

Esperantistaj dimanĉaj kulturfestetoj en Vieno

Kulturaranĝa laborkomunumo de la Viena Esp.-delegitaro, konsistanta el reprezentantoj de ĉiuj mondrigardoj (s-anoj Kraus, Mudrak, Werner, Zodel) aranĝis ek de Novembro 1947 je dimanĉaj antaŭtagmezoj en la kunvenejo de la Viena Esperanto-Centro meditigajn kulturfestetojn sur bazo de pure

humana mondkoncepto, egalsenca al la Zamenhofa „homaranismo".

La 15an de Novembro 1947 post enkondukaj vortoj de s-ano Zodel (represitaj sur paĝoj 1—3) parolis s-ano Werner „pri la senco de la vivo". Klasikajn muzikaĵojn prezentis sur fortepiano profesorino Brünner.

La 18an de Januaro 1948 prelegis s-ano Hugo Kraus pri „Homoj kiel parencoj" laŭ ideoj de Prentice Mulford. Melodiojn de Schubert kaj Grieg majstre prezentis kapelestro Nikl kaj f-ino Kreuzig.

La 15an de Februaro parolis s-ano Jeitler pri „Gojo, nektaro de l' vivo". Kvarmembra parolhoro prezentis la himnon „Al la ĝojo" de Schiller en la traduko de Kalocsay. Kapelestro Nikl kaj koncertkantisto Stahl prezentis parte esperantigitajn kantojn de Schumann kaj Grieg, aliaj samideanoj deklamis himnojn.

La anoj de la laborkomunumo alternas en la ĉefparoladoj, la aliaj anoj kunagas per deklamoj. La bona viziteto promesas sukcesan daŭrigadon de la valoraj aranĝoj, unufoje en ĉiu monato.

Saluton al s-ano Franz Scheibenreiter

Kun granda ĝojo ni povas komuniki al la aŭstria Esperantistaro, ke nia kara s-ano Franz Scheibenreiter, vaste konata kiel eldonisto de la multŝatata iama aŭstria „Verda Revuo", post longaj jaroj fine hejmenvenis el la soveta militkaptiteco.

Ni ĉiuj salutas lin elkore kaj esperas, ke li ankaŭ en nia rekonstruita AEF kunlaboros kaj denove dediĉos siajn sciojn kaj energiojn al la aŭstria Esperanto-movado.

Vienaj E-grupoj atentu!

La Viena Esperantista Delegitaro kiel Landa Organizo de AEF de Vieno ankaŭ bezonas financan bazon por povi plenumi siajn devojn rilate al propagando kaj disvastigo de Esperanto.

Tial la Delegitaro en sia kunsido de la 3. 12. 1947 unuvoĉe decidis, ke ĉiui grupoj de siaj grupkotizoj pagu po membro 40 g ĉiumonate al la VED.

La monata membrokotizo al AEF de ŝ. 2.— do estu en Vieno dividata jene: ŝ. 1.— apartenas al la centro; 40 g estas pagotaj al VED kaj 60 g restas al la grupo.

Grupoj, kiuj povas pruvi per faktoj, ke ili pro specialaj cirkonstancoj ne povas pagi la VED-kotizon de 40 g. rajtas interrilati kun la estraro de la Delegitaro pri eventuala malaltigo de la kotizo.

Turista Asocio „La Naturamikoj" de Aŭstrio

La 25. 10. 1947 okazis sur la Raxalpo konferenco inter la Stiriaj grupestroj de la asocio. K-do Eder parolis antaŭ 70 estroj pri la graveco de Esperanto precipe por la granda amaso de la „Naturamikoj". La plejmulto el ili estis por Esperanto, kelkaj restis indiferentaj kaj nur 3 esprimiĝis kontraŭ, opiniante, ke Esperanto ne kapablas esprimi ankaŭ delikatajn problemojn. Tamen ili promesis ne malhelpi, se Esperantisto intencos enkonduki la lingvon en iliajn grupojn. Do, Esperantistoj, eluzu tiun okazon!

La 3. 11. 1947 okazis en la oficejo en Graz prelego-parolado de k-do Eder pri Esperanto. Samtempe estis montritaj korespondaĵoj el multaj landoj, gvidlibroj, verkoj kaj gazetoj. Ekde 10. 11. 1947 estas gvidata de k-do Eder E-kurso kun 25 partoprenantoj. Kiel lernlibro servas la kurslibro de AEF.

J. Eder, Esperanto-fakestro de la TVN., Graz, Stempferg. 6/1.

E-Societo „Danubio" — Wien VII., daŭrigas sian agadon per aranĝo de diversaj seriozaj kaj humoraj paroladoj en la societkunvenoj. — Kore kaj ĝoje ni salutas nian s-anon Franz Scheibenreiter reveninta el la militkaptiteco. — Societano Wolfgang Gärtner sukcese faris la ŝtatan E-ekzamenon. — En la societa „Franz Vasta"-biblioteko estis invitataj pli vigle uzi la bibliotekon — ĝi nun nombras 410 volumojn — por perfektiĝi en la lingvo per bona E-literaturo.

Fervojista Fakgrupo

La 20. 1. 1948 okazis en la „ĝenerala direkcio“ grava estrarkunsido. Reprezentantoj estis: por la „ĝenerala direkcio de aŭstriaj fervojoj la ĝenerala sekretario s-ro Dantine, por la fervojista sindikato k-do Kovačič, por AEF la prezidanto Paul Glüxmann, por teknika fako fervojista s-ro inĝ. Josef Frischauf, kaj s-ro Katzianka, redaktoro de „Weltsprache“. La plej instiga kaj grava temo estis: Ĉu la fakgrupo aliĝu al „Tutmonda liga fervojista“, kiu estas fondota dum SAT-kongreso 1948, aŭ ĉu aliĝo al ILEPTO (Internacia ligo por Esperanto en poŝtoj kaj telekomunikoj). Decido estis unuanima: La aŭstria fervojista fakgrupo estas preta, kunlabori kun la „Tutmonda fervojista ligo“ kaj rekomendas, krei fundan kontakton kaj kunlaboron kun ILEPTO. Interligilo estu samtempe la fakgazeto por „Tutmonda fervojista ligo“. Preparoj por fondo de TFL estu okaze de „Danubvala Esperanto-konferenco“ dum pentekosto en Györ (Hungarujo). Kolego Luis Angermayer, ĉeftelegrafisto de la direkcio Linz, verkis cirkuleron, direktitan al ĉiu telegrafisto fervojista en Aŭstrio kaj eksterlando, ke Esperanto estu la lingvo por la fervojistaj telegrafistoj, por ke finfine estu forigataj la malfacilaĵoj en la internacia fervojista telegrafio. La cirkuleroj estos distribuotaj en ĉiuj aŭstriaj kaj eksterlandaj pligrandaj stacioj. Por kolekti ĉiujn nomojn de fervojistaj Esperantistoj en Aŭstrio, la provincaj delegitoj estas petataj, noti la nomojn kaj sendi al kasisto: Josef Hawla, Wien III., Grasbergergasse 4, XIII/I/9. La Sindikato kaj Generala direkcio interesiĝas pri la nombro de la fervojistaj Esperantistoj en tuta Aŭstrio. Disaŭdigoj de la fakgrupo okazas ĉiun duan lundon en la monato je la 10,30 h en Radio Wien II. Sendu viajn impresojn kaj kritikon al: Ferv. Fakgr. Josef Zink, Wien X., Endlichergasse 2—4 IV/II/17.

Landeck, Tirol

La grupo „Espero“ okazigis la 21. 11. 1947 sian ĝeneralan kunvenon. Estro Hilkersberger raportis pri la malfacilaĵoj venkotaj por fondi la grupon. Li menciis la estiĝon de la nuna aŭstria Esp-ista junular-movado, kies fondo okazis en Landeck, kaj kiu formas parton de AEF tiom longe, kiom AEF konservas sian superpartian karakteron konformantan la ideon de Esperanto. La estro dankis al ĉiuj kunlaborintoj pro ilia energia helpo, precipe al la ges-anoj Comina, Kössler kaj f-ino Ebli Linda kaj priparolis la plej proksimajn taskojn. Estas planate la gastigo de 15 holandaj Esp-istaj gejunuloj, eble aŭkaŭ renkontiĝo kun italaj kaj svisaj fervojistaj k-doj. La novelektita estraro konsistas el: A. Hilkersberger, estro; H. Comina, estro-anstataŭanto; E. Linda, kasistino; J. Walser, sekretario; St. Kössler kaj s-ino Hilkersberger, asesorinoj.

E-grupo Leoben, Steiermark

Mi havis la okazon viziti la grupon Leoben la 21. 11. 1947 kaj transdoni al ĝi la salutojn de la AEF-centro kaj de la „Amikoj al Esperanto“, krome raporti pri nia E-Kongreso en Kufstein, UEA — kaj SAT-Kongresoj, libroŝparado k. t. p. Ceestis 15 ges-anoj, kiuj interparolis Esperantlingve kaj mi povis konstati viglan grupvivon. La membroj ĝojige estas relative junaj kaj ili ĝenerale montris bonan Esperantoscion. Kiel ĉie en Aŭstrio pro la specialaj cirkonstancoj sekve de la okupado suferas la varbado. G. K.

Dankon al samideanino H. Gaugitsch

La desegnaĵojn por la titolklišoj de la diversaj rubrikoj en nia Revuo afable faris sanino Hermine Gaugitsch, Wien, al kiu ni esprimas per tio nian elkoran dankon.

Esperanton en la praktikon

S-ro Fred Sibitz, tabaka ĉefvendejo kaj grandkomercisto en Bruck a. M., Koloman Walisch-Platz 8, Aŭstrio, okaze de la kristnaskaj kaj novjara festotagoj dissendis presitajn bondezirojn de la firmo en lingvoj germana, angla kaj Esperanta.

Samokaze dissendis Esperantlingve presitajn poŝtkartojn s-ano J. Javernik, Voitsberg, Steiermark.

Universala Esperanto-Asocio

Ĉefdelegito por Aŭstrio: Rajmund Cech, Wien VII/62, Lindengasse 8/II/11

La Centra Oficejo de UEA fiksis la kotizojn por 1948 por membreco kun jarlibro je ŝ 10.—; por membroj-abonantoj (kun jarlibro kaj revuo „Esperanto") je ŝ 25.—, por subtenantoj je ŝ 50.—. La nura abonprezo por la revuo estas ŝ 20.—.

Norvegujo ankaŭ helpas al Aŭstrio

En Oslo fondiĝis en 1946 komitato, kiu organizis la restadon de 60 infanoj de dummilite ekzekutitaj aŭstriaj liberec-batalintoj dum 8 monatoj. Post reveno de tiuj infanoj estu denove invitataj al Norvegujo 300 infanoj de aŭstriaj viktimoj de la faŝismo. Pro tio kaj pro aliaj jam faritaj helpoj la norvega popolo gajnis la sinceran simpation de Aŭstrio.

Militkaptitoj praktikas Esperanton

El Nantes, Francujo, ni ricevas de militkaptitaj germanaj s-anoj jenan leteron kun aldonitaj fotoj, el kiuj ni unu (muzikorkestro) publikigas:

Kara samideano, ni militkaptitaj Esperantistoj sendas al niaj s-anoj en via bela hejmlando Aŭstrio tutkorajn salutojn.

Nia malgranda asocio laboras tute

En multaj lokoj de Aŭstrio ankoraŭ ne ekzistas Delegitoj. La ges-anoj estas invitataj al aliĝo kaj al transpreno de delegita funkcio, en pli grandaj lokoj ankaŭ funkciu vic-delegitoj kaj fak-delegitoj.

Interesitaj Esperantistoj estas petataj postuli aliĝilojn kaj informojn.

laŭplane. La teatro de nia militkaptitejo ludas eĉ kelkajn Esperantajn teatraĵojn. Mi sendas hodiaŭ du fotografaĵojn por publikigi ilin en via gazeto.

Al vi kaj ĉiuj samideanoj ni deziras ĉion bonan kaj salutas vin

samideane Bruno Galuschka.

Nantes, 31. 10. 1947.

Rimarkigo de la redakcio: Ni tre ĝojis pri ĉi tiuj salutoj kaj deziras al niaj s-anoj, ke ankaŭ por ili (se tio dume ne jam okazis) baldaŭ lumu la tago de ilia plena libereco.

La kaŭzo de ĉiu homa mizero estas la nescio. Buddha.

LABORISTA ESPERANTISTARO

Adreso: Austria Laborista Esperantistaro, Wien I., Neutorgasse 9

„La Esperantista laboristo“,

ła organo de franca laborista Esperantistaro estas ankaŭ abonebla por Aŭstrio. La jara abono estas 8 internaciaj respondkuponoj. Do, iru al via poŝtejo kaj sendu la respondkuponojn al ALE, Wien, kiu komunikos la nomojn al Parizo de kie vi regule ricevos ła gazeton.

Komunistoj, aliĝu al ALE

La komunista sekcio de ALE apelacias al ĉiuj komunistaj Esperantistoj aliĝi al ALE. Komprenu la taskon, kiun ni devas plenumi kaj fortigu la laboristan E-movadon.

Donaco por ALE

K-do Glüxmann, la prezidanto de AEF, donacis por ALE la sumon de § 50.—. Ni kore dankas.

„Internacia Esperanto Servo“
N-ro 1/1948

aperis fine de Januaro. Gi estas presita, 6-paĝa, belaspekta. En la unua n-ro troviĝas jenaj artikoloj: ĉefartikolo, memorigaj artikoloj pro la mortotagoj de Karl Liebknecht, Rosa Luxemburg kaj Lenin, la alvoko de la SPÖ pro la malsukceso de la Londona konferenco, raporto de sudafrika ĵurnalisto pri sia vizito al ĉekoslovakia respubliko, artikolo pri la forigo de la malamata hungaria ĝendarmaro en la nova Hungario, raporto pri la or-serĉado en la koncentrejo de Auschwitz, novaĵo pri la forigo de la rubo en la germana urbo Aachen, komunikoj de la redakcio. — Abonebla ĉe „IES“, Wien I., Neutorgasse 9. Abonprezo por numero ŝ 1.— (por membroj de ALE ŝ —.50).

„Interligilo“

estas la monata informilo hektografita de ALE pri organizaj problemoj de la E-laboristaro. Gi estas destinita nur por membroj de ALE kaj al ili senkoste dissendata. Adreso: Wien I., Neutorgasse 9.

Membrokotizo al ALE

En la laborkunsido dum la E-Kongreso en Kufstein estis interkonsente fiksata j a r a kotizo al la Aŭstria Laborista Esperantistaro je 6 eksterlandaj leterafrankoj, t. e. nuntempe ŝil. 6.—.

Ni esperas, ke ĉiuj klaskonsciaj laboristaj Esp-istoj aliĝos al ALE, por ke ni povu organizite enpenetri la sindikatojn kaj laboristajn partiojn kaj tie veki la intereson pri Esperanto. Se tio al ni prosperos, ni certe povos sukcese antaŭenpuŝi la E-movadon inter la aŭstria laboristaro.

Tial ni denove alvokas ĉiujn Esperantistajn gek-dojn, ke ili t u j anoncu sian aliĝon al ALE, indikante la partiapartenecon, ĉu socialista aŭ komunista, kaj enpagu la kotizon por la duona aŭ tuta jaro.

Ekkrio de Aŭstrio al la mondo

Okaze de la disiro de la konferenco en Londono inter la Grandaj Kvar, la Socialista Partio de Aŭstrio direktis la 21. 12. 1947 jenan alvokon al la aŭstria popolo, kiu bedaŭrinde ankoraŭ nun plene validas:

Ni sentas nin devigataj antaŭ nia konscienco en unu el la plej seriozaj horoj en la historio de nia lando elparoli publikan diron.

La malsukceso de la Londonaj intertraktoj estis por Aŭstrio refoja grava seniluziiĝo, kiu apenaŭ estas

mildigata per tio, ke intertrakta komitato de la kvar grandpotencoj promesas, en Februaro de la nuna jaro denove intertrakti pri la detalaĵoj de la ŝtatkontrakto.

Pli ol du kaj duona jaroj atendas la popolo de Aŭstrio la ŝtatkontrakton. La necerteco de la politika situacio malakcelis kaj prokrastis la ekonomian rekonstruon de Aŭstrio multloke, kelkloje ĝin tute malebligis. Kaj nun kuŝas antaŭ ni nova periodo de la atendado, periodo de la pliigo de nia suferado, de nia mizero, de nia turmento.

Pli ol du kaj duonaj jaroj pasis depost la haltigo de la malamikaĵoj, sed ankoraŭ ĉiam estas fremdaj militistaj registaroj en nia lando, kiuj malutilas la leĝdonadon kaj administradon, kiuj ne lasas esprimiĝi la liberan volon de la aŭstria popolo.

Ankoraŭ ĉiam ni havas okupajn armeojn de la grandpotencoj en nia lando, kiujn ĉi tie neniu bezonas kaj kiuj nur faras domaĝojn.

Ankoraŭ ĉiam estas miloj da loĝejoj, estas centoj da hospitaloj, refreŝigejoj, orfejoj, lernejoj, oficejoj, hoteloj ktp. okupataj de la okupaciaj trupoj kaj de la fremdaj militistaj registaroj, ja okazas ankoraŭ eĉ novaj postuloj.

Ankoraŭ ĉiam estas forprenataj centoj da laborejoj de la aŭstria popola ekonomio, estas uzataj necesaj posedaĵoj ne por Aŭstrio, sed por okupa potenco.

Ankoraŭ troviĝas centmiloj da elhejm igitaj personoj en la lando, kiuj signifas premantan ŝarĝon.

Ankoraŭ ĉiam estas la malsekureco granda, estas aŭstriaj civitanoj sen juĝejaj verdiktoj arestataj kaj eĉ ellandigataj.

Ankoraŭ ĉiam troviĝas miloj da aŭstrianoj en militkaptiteco.

Ankoraŭ ĉiam ni ne havas la rajton malhelpate fari kontraktojn kun aliaj ŝtatoj, kiuj povus levi kaj revivigi nian popolan ekonomion.

Ankoraŭ ĉiam ni estas hermetike izolitaj de la eksterlando kaj ne havas la rajton propradecide doni en- kaj elvojaĝpermesojn.

Ankoraŭ ĉiam al ni ne estas permesate, leterojn kaj telegramojn sendi necenzurite eksterlanden, ankoraŭ ĉiam estas kontrolataj telefonaj interparoladoj kontraŭ la aŭstria rajto.

Unufraze: Ni ankoraŭ ĉiam estas subpremata popolo, katenita je manoj kaj piedoj, ne povante sin suprenlabori el propra forto.

Spite al tio ni ne perdas la kuraĝon. La popolo de Aŭstrio laboris du kaj duonan jarojn malgraŭ ĉiuj malhelpaĵoj pri la rekonstruado de la lando kaj — ni rajtas diri tion sen troigo — akiris konsiderindajn sukcesojn. Ni scias nin konkordaj kun la laborantaj amasoj de nia lando, kiam ni elparolas, ke ankaŭ estonte okazos ĉio, kion ni mem povos fari, por akceli la rekonstruon. Ni scias, ke laboro estas necesa, laboro kaj ankoraŭfoje laboro, por ke ni povu vivi.

Sed dependas ne sole de la popolo de Aŭstrio, rekonduki la landon en normalajn, ordajn vojojn. Ni bezonas la helpon de la mondo, por povi helpi al ni mem.

Pro la malfeliĉoj ne ricevinte la ŝtatkontrakton, ni turnas nin al ĉiu unuopa el la potencoj, kiuj decidas pri nia sorto. Se oni ankaŭ ne povis interkonsentiĝi pri la ŝtatkontrakto, nenio malhelpas al ĉiu unuopa grandpotenco koncesii al ni plifaciligojn.

Ju pli da faciligoj donas al ni ĉiu grandpotenco, des pli frue ni supervenkos la periodon de la malcerteco, kiu disigas nin de la momento, en kiu ni finfine per ŝtatkontrakto ricevos sekurigitan fundamenton de nia ekzistado.

Spite la al ni surŝarĝitaj malfeliĉoj ni ne ĉesos: Ni plu batalos por la rajto de Aŭstrio.

Ni apelacias al ĉiuj bonvoluloj, meti en komuna laboro la fundamentojn por pli bona estonteco de la lando kaj de ĝiaj loĝantoj.

La laboranta popolo de Aŭstrio jam ĝis nun altgrade plenumis sian devon en tiu ĉi malfacila tempo. Gi rajtas atendi de la potencoj, kiuj okupadas la landon, ke ankaŭ ili plenumu sian devon.

Ju pli la grandpotencoj kontribuas por mallongigi la suferadojn de la aŭstria popolo, des pli grandiĝos la perspektivo, ke la paco estos konservata. La intereso de Aŭstrio interligiĝas kun la intereso de la mondo. Libereco kaj sendependeco de Aŭstrio signifas certigon de la paco en la mondo.

La partiestraro de la
Socialista Partio de Aŭstrio.
Esperantigite de A. B.

1848—1948

En Marto 1948 estas cent jaroj depost la eksplodo de la revolucioj en la jaro 1848 en Parizo, Vieno, Berlino kaj Germanujo, en norda Italujo kaj Hungarujo.

Kvankam estis burĝa ribelo kontraŭ la feŭdalismo, ĝin tamen ankaŭ partoprenis laboristaj grupoj kaj la revolucio alportis por la tuta laboristaro diversajn politikajn kaj socialajn plibonigojn. Tiu ĉi revolucio estis nur la komenco de sociala evoluo, kiu ankaŭ en la jaro 1948 ne estas finita, kaj kiun profetis kantisto de libereco post la pasa malvenko de la revolucio de 1848:

... Ankoraŭ ne forpasis ĉiuj Martoj! Ho, ankoraŭ ni vivas, turmentata generacio, enmeze de maltrankvilo, de mizero. Kaj tamen estas nia sorto daŭrigo kaj plenumo de gloraj tempoj kaj faroj de la historio: estas la evoluo. „Pli kuraĝa ĝi revenos", la heroldo de la libereco, la batalanto por la rajtoj de la popolo, la serĉanto de nova homeco! Gi plenumas, ĝi aliigas la mondon! Kaj tiu ĉi mondo, ĝi tamen moviĝas!

Kunveno de socialistaj Esperantistoj en Györ

Pentekoste 1948 okazos la Hungara Esperanto-Kongreso en Györ kaj la socialistaj k-doj en Hungarujo intencas aranĝi fakan kunvenon inter la partoprenantaj soc. Esperantistoj en- kaj eksterlandaj kaj ankaŭ invitas la aŭstriajn soc. k-dojn veni al Györ por krei pli intiman kontakton reciprokan.

Hungaraj sindikatoj apogas Esperanton

Laŭ sciigo de k-do P. Balkany, vicprezidanto de la Frakcio Esperantista en la hungara Socialdemokrata Partio, en Budapest 12 sindikatoj apogas la Esperanto-societojn kaj kelkaj aranĝis Esperanto-kursojn. Ampleksaj artikoloj pri Esperanto aperis en diversaj laboristaj gazetoj.

21-a Kongreso de SAT

La internacia kongreso de Laboristaj Esperantistoj okazos inter la 31. 7. — 5. 8. 1948 en Amsterdam, Holando.

Partoprenemuloj anoncu sin ĝis 10. 4. 1948 ĉe la landa SAT-peranto Ludwig Sager, Wien 16., Maderspergerstraße 14/12.

Kongreskotizoj:

	Antaŭ la 10. 4. 1948:	post la 10. 4. 1948
Por SAT-anoj	ŝ. 28.—	ŝ. 40.—
Por geedzoj (SAT-anoj	ŝ. .48—	ŝ. 60.—
Por Ne-SAT-anoj	ŝ. 40.—	ŝ. 52.—
Por geedzoj (ne-SAT-anoj	ŝ. 70.—	ŝ. 80.—

Per la formularo aldonita al „S-ulo" de Februaro 1948 anoncu vin kaj enpagu la kotizon je la poŝtŝparkas-konto 193.114, Ludwig Sager, Wien. Por la pasporto estas 5 fotobildoj necesaj.

La SAT-peranto estas parolebla ĉiuvendrede je la 19-a h. en Wien 16. Klausgasse 32, Naturfreundeheim.

3-a Kongreso de SAT-amikaro — okazos inter la 27. — 29. 3. 1948 en Rennes (I.-et.-V.) Francujo. La aŭstriaj SAT-anoj ege bedaŭras ne povi partopreni, sed ili dankas pro la invito kaj esprimas al la SAT- amikaro sian simpation kaj transsendas al la kongreso kamaradajn salutojn.

SAT-rondeto Wr. Neustadt — fondiĝis kiel la unua en la liglandoj. Kiam sekvos la aliaj gek-doj el aliaj landoj?

Vienaj SAT-anoj — regule kunvenas ĉiuvendrede je la 19-a h. en la ejo de „Nia Vojo" Wien 16., Klausgasse 32.

SAT-helpantoj — Krom la helpantoj sciigitaj en AER numero 10-12/1947, pĝ. 168, anoncis sin por la lando Niederösterreich k-do Mayr Franz, Klein-Erla 73, Post St. Valentin.

El la aliaj liglandoj ĝis nun ne anoncis sin helpantoj. La afero urĝas kaj la landa peranto atendas, ke la SAT-anoj plej baldaŭ plenumos lian alvokon.

Klerigo kaj sporto en Ruslando

Altlernejoj. 1914 ekzistis en Ruslando 91 altlernejoj, 1946 estis 760 altlernejoj kun 600.000 studentoj. 1938 UdSSR havis 550.000 studentoj; t. e. pli da studentoj ol havas ĉiuj altlernejoj de la eŭropaj grandpotencoj kaj de Japanujo kune. Sole dum la lastaj kvar jaroj la sovetaj altlernejoj estigis 409.000 specialajn fakulojn, inter ili 116.500 inĝenierojn. Ĉe la teknikaj institutoj por teknikaj specialistoj kun mezlerneja klero studadas 1 miliono da personoj.

Akademioj. Antaŭ la revolucio agadis ĉe la rusa Akademio de sciencoj 47 akademianoj kaj 212 sciencteknikaj specialistoj. Al la sciencaj institutoj tiam apartenis 5 laboratorioj, 5 muzeoj kaj ĉirkaŭ 15 diversaj komisionoj. Nuntempe laboras ĉe la Akademioj por sciencoj de UdSSR. 137 akademianoj, 200 korespondaj membroj kaj pli ol 4000 sciencaj specialistoj. La akademio ampleksas 53 sciencajn esplorinstitutojn, 16 laboratoriojn, 35 staciojn, 3131 komisionojn kaj 15 muzeojn. Sole la filioj de la akademio publikigis dum 10 jaroj 5000 da sciencaj laboroj. Krom la Akademio por scienco estis kreataj Akademio por medicinaj sciencoj, Akademio por pedagogiaj sciencoj, Akademio por agrikulturaj sciencoj kaj Akademio por arkitekturo.

Lernejoj. 1936—1940 estis eldonataj 470 milionoj da instrulibroj. 1946 komencis sian instruagadon jam preskaŭ ĉiuj lernejoj, detruitaj de la germanoj. La analfabeteco preskaŭ plene estis forigata, nur en la tre malproksimaj regionoj ankoraŭ ekzistas 2—3 procentoj. 1914 estis 8 milionoj da lernantoj, 1940 ekzistis 35 milionoj. La nombro de la instruistoj altiĝis de 230.000 al 1,210.000.

Bibliotekoj. 1937—1945 aperis en UdSSR pli ol 4 miliardoj da libroj, inter aliaj Puschkin kun eldonkvanto de 12 milionoj, Leo Tolstoj kun 10 milionoj kaj Maxim Gorki kun preskaŭ 10 milionoj. 1944 pruntis la bibliotekoj de UdSSR 100 milionojn da libroj al 15 milionoj da legantoj. 1 914 ekzistis 13.000 bibliotekoj kun preskaŭ 9 milionoj da libroj. 1941 ekzistis pli ol 80.000 bibliotekoj kun 147 milionoj da libroj. Krome ekzistas nuntempe pli ol 40.000 vilaĝaj legejoj kaj kluboj.

Teatro. 1914 ekzistis 153 teatroj; el ili estis 14 operaj teatroj; ne ekzistis teatroj por junaj rigardantoj. 1945 ekzistis en Sovetio 729 teatroj, el ili estis 36 operaj teatroj kaj 49 teatroj por infanoj. 1945 vizitis 128 milionoj da homoj la sovetajn teatrojn, t. e. 12½ milionoj pli ol en antaŭa jaro. 109.000 rondoj okupiĝas pri arta agado de nefakulaj aktoroj kaj unuigas pli ol 3 milionojn da homoj. Ĉe la konkuro de la kanthoroj en 1945 partoprenis pli ol 200.000 kantistoj.

Sporto. 1921—1941 estis instalitaj 600 stadioj, 14.000 sportejoj, 6000 skistacioj kaj 500 akvovojoj. En la jaroj 1941—1945 partoprenis 60 milionoj da homoj ĉe sportaj konkuroj. En 1945 ekzistis 27 sportfakoj kaj 123 sovetaj rekordoj. 1941—1945 estis ekzercataj 5,250.000 skikurantoj kaj 1,665.000 militaj sportuloj. En Sovetio ekzistas en la ŝakludo 9 grandmajstroj, 55 majstroj kaj 91 majstrecoj. 1 miliono da homoj kunagas en rondoj kaj sekcioj.

(Ekstrakto el „Die Brücke", Wien.)

Esperantigis A. B.

Aforismo

Jen karakterizaĵo de eminenta kaj bona homo: ke ĉiam unue li atentas la tuton kaj la aliuloin, sin mem laste.

Adalbert Stifter.

Katolika Esperanta Vivo

Adreso: Austria Katolika Ligo Esperantista (AKLE), sekretario Walter Mudrak, Wien III., Beatrixgasse 19/9, Austrio

„Espero Katolika“ — la oficiala monata organo de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), regule aperanta, estas abonebla ĉe la supre citita adreso de AKLE. Jarabono nuntempe ŝil. 15.—.

„Vojo, Vivo, Vero“ — oficiala eldonaĵo de Internacia Katolika Informejo (IKI). Abonebla ĉe AKLE, jarabono nuntempe ŝil. 6.—.

Katolikaj ges-anoj! Abonu kaj legu niajn oficialajn internaciajn organojn!

Katolikaj gesamideanoj de Wien — kunvenas ĉiun duan kaj kvaran mardon de la monato de 17—19.15 h. en la hejmo de „Kreuzbund“, Wien I., Graben 13/II. Programo:

Pritraktado de Eklezia Historio, referanto s-ano kalkulkonsilisto Ludwig Siedl. — Perfektiga instruado; kursgvidanto: s-ano L. Siedl. — Poste raportoj, prelegoj de diversaj ges-anoj; kantado komuna.

Ekzamenon ŝtatan pri instrukapableco dum Decembro 1947 faris kun distingo niaj ges-anoj: S-anino Lisl Oberlechner, Saalfelden, kaj s-ro Carl Gasperini (pri scio), Wien.

Ni sincere ĝojas pri tio kaj gratulas al ili.

Karaj gastoj en nia kunveno. — Vizitis nin en Wien s-ano Hutchinson el Belfast, Irlando, parolante tre interese pri siaj travivaĵoj pere de Esperanto en la tuta mondo, plue li raportis pri la katolika Esperanta vivo kaj la misia agado de sia katolika popolo Irlanda.

Alia kara gasto estis s-ino Lisl Oberlechner, Saalfelden, okaze de ŝia ŝtata Esperanto-ekzameno.

Liglando Salzburg. — Katedrala vikaro pastro J. Kaps, nia sukcesa predikinto en Kufstein, malgraŭ multokupiteco, kolektas por nia afero ĉiujn katolikajn ges-anojn en la liglando Salzburg. Ili anoncu sin ĉe: Domvikar J. Kaps, Salzburg-Parsch, Gaisbergstr. 7.

Gazetoj raportintaj pri Esperanto — kaj ankaŭ pri la E-kongreso en Kufstein estas jenaj laŭ nia scio: „St. Rupertsbote“ (Salzburg); „Kärntner Kirchenblatt“ (Klagenfurt); „Die Wende“ (katol. porjunulara gazeto, Wien); „Wiener Kirchenblatt“ (Wien); „Sonntagspost“ und „Der Volksmund“ (Kufstein).

Ges-anoj! Varbu ĉe la gazetaro por Esperanto, alsendu ekzemplerojn kun E-raportoj, tradukaĵoj Esperantaj k. s.

„Kreuzbund“ (Krucligo) — katolika sobreco-movado por sana vivo, kun sia rektoro pastro Franz M. Zimmerl ĝojige favoras kaj helpas la katolikan Esp.-aferon. En ĝia „Kristnasko-cirkulera letero“ enestis anonco pri la regulaj kunvenoj de la katol. Esp.-istoj.

Advento-meditado — Kristnasko-pretiga, okazis la 16. 12. 1947.

Post-Kristnaska festeto — okazis la 13. 1. 1948.

„Katolikismo kaj Esperanto“

Pri tio raportas en detala artikolo la fama, tre ŝatata katolika Revuo „OECO“, eldonata en Porto Alegre, Rio Grande do Sul, Brazilo. Enestas ankaŭ Esperanto-Kurso, gvidata de de eminenta samideano jezuito pastro Jozefo Nogueira Machado S. J.

kiu, kun aliaj katolikaj pastroj, faras viglan propagandon por Esperanto inter la katolikaro, kiu formas laŭ statistiko de 1940, 95% de la popolo Brazila. Troviĝas tie ankoraŭ multaj aliaj katolikaj pastroj esperantistaj, kiuj ne povas dediĉi sin al speciala E-propagando pro aliaj devoj. Inter la laikaj gvidantoj elstaras Prof. D-ro. Everardo Backheuser, fama sciencisto kaj verkisto, LK-ano.-Multe nun floras Esperanto en Brazilo, same kiel en Argentino kaj aliaj landoj. (Laŭ „Espero Katolika".)

En Plymouth, la brita havenurbo, fondiĝis grupo de katolikaj esperantistoj post multnombre vizitita Di-servo, dum kiu predikis pastro Peppard, ph. d., B. S. C., akcentante Esperanton kiel tre utilan ilon por kontakto kaj interkomunikado kun katolikaj eksterlandaj. (W. M.)

Por kuraĝigi kaj progresigi la novan grupon,

sendu salut-kaj aliajn leterojn al: Katolika Esperanto Grupo de Sta. Paŭlo, p/c s-ro. Arturo Hough, Str. Budeaux, Plymouth, Devonshire, Anglujo.

Pozitiva Paclaboro / Internacia Civilservo por la Paco

La tiucela vere ideala, efektiva laborkomunumo (vidu koncernan artikolon en AER Okt.-Dec. 1947) faris lastsomere konsiderindan servon kaj helpon al infan-malsanulejo „Preyersches Kinderspital" en la Xa distrikto de Vieno. Kuniĝis nun denove nombro de tiaj volontuloj al servo de ligno-hakado post novjaro; hakis kaj disponigis lignon al speciale bezonindaj malriĉaj familioj. La hakado okazis en la regiono de Eckartsau kaj kunigis la partoprenantojn ankaŭ spirite kaj anime. Vizitis ilin ankaŭ la parohestro. — Por sekvanta somero estas projektitaj pluaj tiaj aranĝoj en Vieno kaj cetera Aŭstrujo. Partoprenos ankaŭ samcelanoj el aliaj landoj, kiuokaze la lingva diverseco certe ree ludos rolon. Por Esperanto estas intereso. Estu ankaŭ intereso por la afero flanke de la Esperantistaro kaj ambaŭ idealaj movadoj pli kontaktiĝu kaj amikiĝu! Pluaj raportoj laŭeble sekvos. W. Mudrak, Vieno.

(Eventualajn skribaĵojn oni povas direkti al „Internacia Civilservo" Wien IX., Liechtensteinstraße 49.)

Rajtoj de l'homo

De Robert Skorpil

Ili estas la nerezigneblaj rajtoj de la homo, fariĝi, kiu li estas: La rajto de la maturiĝo interna kaj ekstera; la rajto, sin formi personulo, kiu posedas vizaĝon kaj nomon. Ili estas la denaskaj rajtoj pri vivo kaj sano, pri liberaj kredo kaj konscienco, pri edzeco kaj familio, pri laboro kaj partopreno al la bonoj teraj; estas rajtoj, kiuj radikas en la natura moralo kaj rangiĝas antaŭ la ŝtata leĝaro; estas rajtoj pri digno kaj libereco, kiuj ekzistas tial, ke Dio kreis la homon laŭ si mem.

Ili estas rajtoj, pri kiuj la homo oftege konsentis esti trompataj, pri kiuj li mem tro ofte sin trompis. Estis homrajtoj, kiujn facilanime li malpostulis, kiam li persvadiĝis, senpere deveni de la simio; kiam li lasis al si „science pruvi", esti nur rezultaĵo de heredo kaj cirkonstancoj.

Estis rajtoj de l'homo, kiujn li lasis al si maldoni de diigita unuopulo aŭ de diigita „amaso"; kiujn li oferis al totalismo, kiu ne plu lasis al li ion, kio de libereco kaj digno distingas la homon. Tiel li fariĝis voĉdonilo kaj furaĝo de kanonoj, materialo el homoj, numero kaj akto; tiel li fariĝis aŭtomato kaj robotulo.

Ĉiu, kiu atingis la uzon de la racio, scias, ke li estas vermo mizera, kiueble rajtas kurbiĝi premata-ke la rajtoj de l'homo statas malbone tie, kie iu diktadas, kie fekundas malliberejoj, koncentrejoj, sekreta polico, spionado, denuncoj, cenzuro, demandaroj k. s.

Sed ne sufiĉas, liberecon, egalecon, fratecon fari batalvoko. Ĉi tiuin raitojn, kiuj samtempe estas devoj kaj devas esti komprenataj en sia esenco; la

homo maturiĝu en ilin. Libereco ne estas la „rajtoj, enkarcerigi la aliajn", kiel iam idioto deklaris kun esplorado; libereco kreskas el sinrego, ĝi estas unue kaj ĉefe libereco interna, anima.

Egaleco ne estas la rajto, ĉiujn, kiuj estas pli bonaj kaj pli saĝaj ol mi, adapti al mia malpli granda mezuro, senkapigi ĉion eminentan.

Frateco ne estas la rajto, de aliaj forpreni tion, kio plaĉas al mi, laŭ kia ajn regulo.

Egaleco de ĉiuj antaŭ justa leĝo, kaj pli ol frateco, amo al la proksimulo en la senco de la prediko surmonta, povus la pacon alvenigi. Kiu sin taras vera homo, tiu en la homrajtoj trovas ion pli bonan ol modan parolon por la ĉiutago. La homo ne ekzistas por la maŝino, por la ŝtato, por diktatoro, por la partio, por la amaso, por la mondo. Ĉio ĉi ekzistas por la homo, por ke li plenumu sian disimilecon!

Trad. Dr. Adolf Halbedl.

„Hejme"

P. D-ro. J. B. Kao, la fame konata ĉina franciskana pastro kaj fervorega Esperanto-pioniro en sia hejmlando kaj tutmondo, raportas i. a.:

Mi revenis al mia patrolando en la fino de lasta Aprilo. Mi lasis Usonon kaj veturis en Usona milita transportŝipo al Sanhajo, la granda ĉina haveno. La marveturado estis bona kaj trankvila kaj mi havis eminentajn kunvojaĝantojn; diplomatojn, profesorojn, ingĝenierojn, doktorojn, misiistojn, registarajn oficialulojn, bankistojn. Survoje en la Oceano Pacifika okazis la Paska Festo, kaj mi havis la honoron, celebri la sanktan meson por la publiko sur la ŝipo kaj mi predikis en tri lingvoj: ĉina, angla, hispana. Mi havis ankaŭ plezuron, prelegi antaŭ la kunvojaĝantoj pri Esperanto kiel solvo de la problemo de la mondlingvo: mia prelego bone sukĉesis; pli ol 10 personoj de la ĉeestantoj, decidis lerni Esperanton.

La 8an de Aŭgusto mi alvenis en mia Misio de Fengsiang, Shensi. Mi renkontis tre entuziasman kaj simpatian bonvenigon de la parto de mia episkopo, de miaj kolegoj kaj de la lokaj kristanoj.

Mia episkopo donis al mi tutan povon por administri la Diocezon aŭ eparhion en la kvalito de vikario ĝenerala kaj prokuratoro, la plej alta oficio sub tiu de episkopo. — Ne estas facila tasko. La Misiaj entreprenoj postulas konstantan viglon kaj bezonas multan monon, precipe en tiuj tagoj, kiam la vivo-kostoj de Ĉinujo iras ĝis nuboj supren pro la terura senvaloriĝo de la nacia mono, kio estas la sekvo de la japana invado. Sed dank' al Dia helpo ĉio marŝas bone. Por nia movado mi ĝis nun ankoraŭ ne povis fari ion serioze ĉi tie. Sed mi klopodas enirigi Esperanton en la lokan Normalan kaj Mezan Lernejojn; la estroj de tiuj institucioj jam montras grandan intereson kaj simpation. Pli ol dudek intelektuloj de tiu loko studas anglan lingvon ĉe mi du aŭ trifoje posemajne; kaj laŭokaze mi parolas al ili pri Esperanto kaj ili simpatias. Mons-ro Yu-pin nun estas en sia diocezo de Nanking. La Sankta Seĝo faris lin ĉefepiskopo. Li ankoraŭ simpatias kun nia movado.

Katolika Misio, Fengsiang
Sac. J. B. Kao, O. F. M.
Shensi, Ĉinio.

El „Espero Katolika".

Ni gratulas al pastro Carolfi,

OFM, malvona Esperanto-pioniro, kiu instruas Esperanton kiel fakultativan materion en la „Pontificio Ateneo Antoniano en Romo, pro tiu unua sukceso tiurilata kaj esperas realain efikojn en la venontaj jaroj.

Generala kunveno de IKUE

(Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) okazos en Dijon, Francujo. Tie la Franca Ligo de Katolikaj Esperantistoj volas aranĝi la IKUE-kongreson en la unuaj tagoj de Aŭgusto 1948. Pluaj detaloj sekvos.

AŬSTRIA ESPERANTO-INSTITUTO

1. Rezulto de la tradukkonkurso pri la Aŭstria himno.

La elektita trimembra juĝantaro de la Aŭstria Esperanto-Instituto post longdaŭra, detala ekzamenado de la ensenditaj 8 tradukoj de nia aŭstria himno fine trovis tiun de s-anino Christine Siedl la plej bona. Ni tie ĉi represas ĝin apud la originalo kaj kore gratulas la talentan verkistinon.

Die österreichische Bundeshymne	**Himno Aŭstria**
Text von Paula Preradovic	Tradukita de Christine Siedl
Land der Berge, Land am Strome, Land der Äcker, Land der Dome, Land der Hämmer, zukunftsreich. Heimat bist du großer Söhne, Volk, begnadet für das Schöne, Vielgerühmtes Österreich.	Land' Danuba, de kampvaloj, land' de l'montoj, katedraloj, lando de marteloj vi. Hejm' de filoj eminentaj, de loĝantoj por bel' sentaj, multglorata ho Aŭstri'.
Heiß umfehdet, wild umstritten, liegst dem Erdteil du inmitten, einem starken Herzen gleich. Hast seit frühen Ahnentagen hoher Sendung Last getragen, vielgeprüftes Österreich.	Arde ĉirkaŭbatalata, kuŝas en la mez' lokata kiel brava koro vi. Kaj depost praulaj tagoj ŝarĝas vin misiaj agoj, multprovata ho Aŭstri'.
Mutig in die neuen Zeiten frei und gläubig sieh uns schreiten, arbeitsfroh und hoffnungsreich. Ewig lass' in Bruderchören, Vaterland, dir Treue schwören, vielgeliebtes Österreich!	Novajn tempojn ni eniru plenkuraĝe kaj inspiru fratojn ni al harmoni', Fidelecon ni ĵurante patrolandon gloras kante, multamata ho Aŭstri'.

2. Tradukoj de kelkaj germanlingvaj esprimoj.

AEI regule okupas sin pri tradukproblemoj. Jen kelkaj interesaj ekzemploj el la lastaj kunsidoj:

Demando:	Respondo:
Kiel skribi kaj elparoli „Nazi"?	„Nazi" estas mallongigita, malŝaton entenanta esprimo por „nacisocialisto" kaj, ĉar tiu ĉi skribformo jam internacie enkutimiĝis, oni devas — kvankam ne konformas al la vortderivo de „nacio" — elparoli ĝin laŭ la skribformo „Nazi".
„Druckknopf" (am Telephon).	Kontaktbutono.
„Die Schule hat große Aufgaben."	Oni e b l e povas, sed prefere diru: La instruado aŭ lerninstitucio havas gravajn taskojn.
„Ĉu oni povas diri „La lernejo havas grandajn taskojn?"	
Der Angestellte kündigt seinen Dienst.	Li ĉesigas sian servokontrakton.
Das Fenster geht auf die Straße.	La fenestro frontas al la strato.
Blutunterlaufene Augen.	Okuloj sangumitaj (faktermino: ekimozaj).

Ni invitas lingve interesitajn samideanojn, alsendi interesajn lingvajn problemojn, kompreneble nur tiajn, kiujn oni ne povas mem solvi per vortaroj kaj gramatikoj; aŭ partopreni la solvadon de taskoj ne solvitaj. Por hodiaŭ nur unu tasketo: Kiel oni plej bone traduku la germanlingvan esprimon „abblitzen lassen"?

3. **Internacia Scienca Asocio Esperantista** refondiĝis. Interesiĝantoj anoncu sin al la Aŭstria Esperanto-Instituto.

4. **Kurso** por la ŝtataj ekzamenoj **pri instrukapableco** komenciĝos en Marto en la Centra Sekretariejo, antaŭvideble ĉiun mardon de la 17a ĝis 19a h. — Informojn pri la kondiĉoj de la novaj ekzamenoj ĉe „Stadtschulrat" vidu en la germanlingva parto de tiu ĉi numero!

Internacia ESPERANTO-MOVADO

33a Universala Kongreso de Esperanto
Malmö, Svedujo, 31. 7.—7. 8. 1948

Kongreskotizoj. Kongresano pagos sv. kr. 30.—; edzo aŭ edzino de kongresano sv. kr. 20.—; junul(in)o ne pli ol 20 j. sv. kr. 15.—.

Kostoj de la restado. Por la nutrado vi ne pagu al la kongreso. LKK donos al vi konsilojn pri bonaj restoracioj. Vi do mem prizorgos la nutradon per sveda mono.

Proksimumaj prezoj: Matenmanĝo sv. kr. 1.50—2.—; tagmanĝo aŭ vespermanĝo sv. kr. 2.50—5.—, krome trinkmono 10%.

LKK klopodas lui loĝejojn laŭ mendita kategorio. Antaŭpago por loĝejo estas necesa.

Hotelĉambroj por unu nokto sv. kr. 7.—, 9.— kaj 11.—. Privataj ĉambroj sv. kr. 4.— por unu nokto, amasrestejo en lernejo sv. kr. 2.— kaj en tendarejo sv. kr. 1.50.

La partopreno al la ekskursoj kostos inter 4—15 sv. kr. por ekskurso. Kongresa adreso: Universala Kongreso de Esperanto, Malmö, Svedujo.

Rimarkigo por la aŭstriaj ges-anoj: Pro la malfacila havigo de sveda valuto per la Nacia Banko kaj pro la malfacilaĵoj en la akiro de elvojaĝpermeso, ĉiuj partoprenemuloj anoncu sin tuj ĉe la sekretariejo de AEF (reafranko pro respondo!). Sed ni atentigas jam nun, ke supozeble pro la cititaj kaŭzoj nur malgranda delegacio povos veturi al Malmö. — La estraro de AEF.

21-a Internacia Kongreso de SAT

Amsterdam estos la kongresurbo, en kiu okazos la sekvonta SAT-kongreso de 31. 7.—5. 8. 1948. Kongreskotizo ĝis 30. 4. 1948 7 hol. guld. (geedzoj 12 gld.) kaj por ne-SAT-anoj 10 (17.50) gld.

Adreso de la sekretariino: H. Ondenhooven-Bishoff, Bestevaertstr. 127—4, Amsterdam-W., Nederlando.

Internacia Kongreso de Esperantistaj maristoj

Gi okazos la 30. 5. 1948 en Fécamp, haveno apud Le Havre. Sendu aliĝilojn, kuraĝigajn poŝtkartojn ktp. al s-ro Delamare, 32 rue Alexandre-Legros, Fécamp (Seine-Inf.), Francujo.

Scienca Asocio Esperantista

restariĝis kaj provizore nombras pli ol 300 anojn el 28 landoj. Provizoran estraron formas s-anoj Stöp-Bowitz, Woodruff, Makkink, van der Lek kaj Hanus. La organo „Scienca Revuo" pro diversaj malfacilaĵoj ankoraŭ ne povas aperi. Adreso: Sekretario Jaroslav Hanuš, Kladno 1997, ČSR.

Argentino

Rosaria Esperanto-Klubo okaze de la unua datreveno de la klubfondo la 15. 9. 1947 eldonis bele presitan programon. Dum sia agado la klubo kreis bibliotekon, organizis serion de diverstemaj paroladoj, aranĝis poezi- kaj muzikvesperojn, instalis 5 E-kursojn ktp. Por efike apogi nian E-movadon bonvolu sendi el tutmondo poŝtkartojn, leterojn, glumarkojn, E-flugfoliojn k. s. Esperantaĵoj. Adreso: Rosaria Esperanto-Klubo, San Lorenzo 1053, T. A. 93620—24031, Rosario, Argentinio.

Ĉilio

Post monatoj da klopodoj ni sukcesis enkonduki E-kurson en la Centra Universitato, kio antaŭe neniam okazis en Sud-Ameriko.

La eminentulo, kiu donis la permeson por tio malgraŭ la mokoj de stultuloj kaj apogas Esperanton tiamaniere estas s-ro Anibal Bascunan, direktoro de „Las Esenales de Temporada" Universitad de Chile, Santiago, Chile, Sud-Ameriko.

Ĉiuj Esp-istoj tutmonde estas petataj skribi leterojn, kartojn k. s. al la nomita adreso, por kuraĝigi s-ron direktoron A. Bascunan kaj apogi la E-movadon en Ĉilio.

Apelo
al la tutmoda junularo Esperantista

Karaj junaj gesamideanoj. Dum la pasinta jaro (1947) en Bulgario estis amasa brigadista movado, kiun partoprenis multaj gejunulaj fremduloj. Rimarkinde estas, ke kvankam havis grandan sukceson la brigadoj, la junularo ne sentiĝis tre proksima kun la fremduloj. Tion kaŭzis la multlingveco. Dum 1948 en Bulgario estos ankaŭ brigadista movado. Ni proponis al la Asocio de la Popola junularo (S. N. M.) — al la fako „Brigadoj" — ke ni alvoku geesperantistojn el tutmondo, kiuj laboru en tendaroj esperantistaj, t. e. tendaroj en kiuj laboros gejunuloj esperantistoj el fremdlando kaj Bulgario. La Asocio dubis en nia sukceso.

Pro tio ni apelas al ĉiuj junaj geesperantistoj, kiuj dezirus partopreni la tendarojn, ke ili skribu leterojn al la prezidanto de S. N. M. Jivko Jivkov, str. „Al. Stambolijski" No. 11-a (Mladeĵki Dom), Sofio — Bulgario, petante informojn pri nia brigadista movado kaj deklarante, ke se nia S. N. M. organizos esp.-tendarojn vi partoprenos ilin kaj konvinkos ankaŭ aliajn partopreni. (En la leteroj ne menciu pri nia apelo, sed diru ke vi estas multe legінta en „Internacia Kulturo" pri nia brigadista movado, kaj ke tio vin interesigis.)

Vi certe tre bone komprenos la rolon de tiuj ĉi tendaroj por Esperanto.

Unue — En ili oni parolos nur Esperante.

Due — Multaj vialandaj gejunuloj estos allogataj lerni Esperanton nur pro tio.

Trie — Multaj bulgaraj gejunuloj lernos Esperanton nur por renkontiĝi kaj libere paroli kun eksterlandanoj.

Tiuj ĉi avantaĝoj estas bonaj por propagando kaj laboro poresperanta.

En la tendaroj oni laboros senpage dum unu, du aŭ pli da monatoj (laŭdezire) kaj poste la gefremduloj vizitos la vidindaĵojn en Bulgario. Ĉiuj elspezoj: veturado, nutrado, vestado, loĝado k. c. dum la restado en la laborbrigadoj en Bulgario estas por la konto kaj sur ŝarĝo de la bulgara ŝtata registaro.

Karaj junaj gesamideanoj, ni apelas al vi, por la venko de Esperanto, laboru urĝe. Skribu leterojn al S. N. M., agitu inter la junularo en viaj landoj pri la tendaroj, malfermu kursojn esperantajn.

Detalaĵojn kaj klarigojn ni povas sendi al ĉiu, kiu petos tiajn de ni.

Estas preferinde, ke la leteroj al S. N. M. estu kolektivaj (subskribitaj de multaj gejunuloj) de esperantistoj kaj neesperantistoj, kiuj promesas lerni Esperanton, se estos esp-tendaroj.

Karaj gejunuloj el tutmondo al laboro sub la devizo:

„Ĉiu junulo — esperantisto; ĉiu esperantisto — brigadisto!"

Aleksandro Petrunov
Ĉefsekretario de Junulara Fako
ĉe bulgara Esperanto-asocio
Alabin No. 33, Sofio — Bulgario.

Aldona rimarkigo. En la leteroj al S. N. M. oni devas demandi pri la dumĉijara agado. Oni devas demandi, ĉu estas iaj prospektoj en Esperanto. Poste — kiel sia propra plano — ponu, ke estu organizataj Esperanto-tendaroj, klarigante la rolon de Esperanto. Finfine — promesu veni se estos esp.-tendaroj (se eĉ vi ne venus). Ĉion ĉi skribu nur en Esperanto, kaj se eble per aparta letero aŭ poŝtkarto sciigu nin: pri la enhavo de la letero, kaj kiom da personoj ĝin subskribis (per la kolektivaj).

JuF. ĉe B. E. A.

Kvina Internacia Konkurso por la junularo

Patronite de la „Tutmonda Ligo por Internacia Amikeco per la Eklezioj" estas organizita la 5-an fojon konkurso.

1. Temoj: En la kadro de la ĝenerala temo: „Kristo kaj la Universala Frateco" la konkurantoj devos pritrakti la temon jene: Gejunuletoj: Kion diras la Biblio pri la universala frateco? — Gejunuloj: Estanta juna kristano, kian agon konkretan mi devas plenumi hodiaŭ por la paco?

2. Premioj: Estos disdonataj premioj inter 1000 — 25 sv. frankoj kaj 50 honoraj medaloj.

La verkoj devas esti sendataj ĝis maksimume 1. 5. 1948 al la sekretariejo de la konkurso „Kristo kaj la Universala Frateco" 37 quai Wilson, Genève, Svislando, de kiu oni povas peti la detalan programon pri la konkursaj kondiĉoj.

Plano de TJO por 1948

La plano de Tutmonda Junulara Organizo (TJO) por 1948 estas: Ĉiu kursgvidanto de infankurso iros en 1948 dum unu semajno kun sia grupo al alia lando kaj dum unu semajno li kun sia grupo, akceptos eksterlandajn infanojn! La infanoj mem skribu leteron, en kiu ili sciigas, al kiu lando ili prefere irus. Ili sciigu aĝon, sekson ktp. Ni serĉos por ili kontakton kun infanoj en la koncerna lando. La celo estas, ke la infanoj loĝu ĉe samaĝaj gekorespondantoj. La kostoj ne fariĝos tro altaj, ĉar oni nur bezonas pagi la vojaĝkostojn.

Tio provizore nur estas plano kaj ni volonte aŭdos vian opinion pri ĝia efektivigo Koresponda adreso por ĉi tiu afero: S-ro W. Bant, instruisto, Wagemakersweg A 154 a, Groet (NH) Nederlando.

(„La Juna Vivo.")

Alvoko al la poŝtdirektoroj ĉiulande

Heroldo de Esperanto, la en tutmondo ĉie ŝatata E-ĵurnalo, en sia numero 1/1948 aperigis foton de la ĝen. direktoro de Aŭstria Poŝt kaj Telegraf-Administracio, d-ro Karl Dworschak, kun artikolo pri la klopodoj de d-ro Dworschak, kiuj celas instigi la ĝen. poŝtdirektorojn ĉiulande, ke ankaŭ ili subtenu kaj akcelu Esperanton en la poŝta administracio kaj inter la personaro.

Spiritscienculoj!

Geinteresuloj pri „Internacia Spiritscienca Laborkomuno Esperantista" (ISLE) skribu al: s-ro K. A. Metzkes, Burggrafenstraße 52, (22 a) M. Gladbach, Brita Zono, Germanujo. Tiu laborkomuno plenumos siajn porpacajn taskojn en la kadro de nia universala movado (tamen kiel speciala sekcio). Afabla peto: Ĉiuj redaktejoj de Esperanto-Gazetoj en tutmondo estas petataj, represi tiun kompletan notaĵon.

Internacia lingvoscienca revuo pri Esperanto

Eminentaj esperantologoj formis komitaton por eldoni periodaĵon, kiu sin dediĉu al scienca pritraktado de la lingvo Esperanto. Ili estas: Prof. d-ro

Björn Collinder de la universitato Uppsala; prof. d-ro W. E. Collinson de la universitato Liverpool; d-ro K. Kalocsaj, Budapest; prof. Stefano La Colla, Milano; d-ro W. Lippmann, New York; d-ro W. J. A. Manders, Venlo; prof. d-ro E. Privat de la universitato Neuchatel; Mag. V. Setälä, Helsinki; prof. d-ro G. Waringhien, Tours; d-ro inĝ. E. Wüster, Wieselburg en Aŭstrio. Kores̆p. adreso estas: Priv. docento d-ro Paul Neergaard, Gothersgade 158, København K., Danlando.

La periodaĵo nomiĝu „Esperantologio" kaj aperu en kajeroj de 48—64 pĝ. formantaj volumojn de 250—300 paĝojn. Komence oni bezonòs por tia volumo proks. tri jarojn. La abonprezo por unu volumo estas fiksata je 22 angl. šil., 20 danaj kr., 5 uson. dol. aŭ egalvaloro.

Kiu interesiĝas pri la projekto kaj intencas aboni la periodaĵon skribu al la supre citita adreso de d-ro Neergard. Sed ne antaŭpagu!

La eldonado de „ESPERANTOLOGIO" povos efektiviĝi, kiam anoncis sin minimume 350 abonantoj.

Radio kaj Esperanto

(Horindikoj laŭ mezeŭropa tempo.)

Radio Wien — disaŭdigas E-paroladojn nuntempe jene: ĉiumerkrede de 6.35—6.45 matene je ondolongoj 31, 41, 506.8 m, kaj ĉiulunde de 18.30—18.40 MET, ondolongoj 31, 41, 228.6 m.

Auskultu kaj diskonigu la sendojn kaj komuniku viajn impresojn, sugestojn aŭ kritikojn al Radio-servo de AEF, Wien I., Neutorgasse 9.

Radio Praha — dissendas E-programon 1. ĉiutage de la 17.30—17.45 GT. 49,92 kaj 19,35 m; 2. lunde kaj ĵaŭde de la 22.50—23.00, 470 m. Verda Stacio Praha ĉiun unuan lundon en la monato de la 23.00—23.30 GT, 270 kaj 325 m.

Skribu pri viaj impresoj al Esperanto-servo de Radiostacio Praha XII., Stalinova 12, ČSR.

Radiostacio Ostrava — elsendas E-programon dufoje semajne, marde kaj ĵaŭde, ondo 259 m MET, je la 22.50a. Komuniku viajn impresojn kaj dezirojn al Radiostacio Ostrava, Cehoslovakujo.

Radio Paris — dissendas Esperantlingvajn paroladojn ĉiutage de la 18.50—18.30 MET, mallonga ondo 41,21 m. Aŭskultu ilin kaj skribu al „Radiodiffusion Francaise", 118, Champs — Elysées, Paris 8.

Radio Sofia — disaŭdigas Esperantlingvajn informojn kaj prelegojn pri la vivo en la nova demokrata Bulgarujo ĉiumarde kaj ĉiuvendrede je 19.50 MET, mallonga ondo 32.09.

Aŭskultintoj skribu pri impresoj al Radio Sofio, Esperanto-emisio, Sofia, Bulgarujo.

Radioinformoj pri la U. E. K. 1948 — Gis Julio 1948 la LKK de la 33a Universala Kongreso de Esperanto en Malmö okazigas radiodisaŭdigojn la unuan dimanĉon ĉiumonate. La sekvontaj disaŭdigoj okazos dimanĉe la 7. 3., 4. 4., 2. 5., 6. 6. kaj 4. 7. 1948 je la 16.00—16.15 h, ondoj 19.80 kaj 27.83 m. La LKK petas, represi ĉi tiun sciigon kaj mencii en la radioprogramoj naciaj.

Seminario por Esperantistaj geinstruistoj en Francujo

En „Regiona Centro de Popola Edukado" okazis inter la 25. 8. — 14. 9. 1947 unuafoje en nia lando „Provtempo" de Esperantistaj geinstruistoj, organizita de G. E. E. (nialanda asocio de Esp. instruistoj) kun permeso de la Ministerio (de Junularo, Arto kaj Popola Edukado). La celo estas instrui pri la pedagogio de Esperanto, ne nur teorie, sed ankaŭ praktike. Prelegoj, lekcioj, lecionoj al infanoj okazas ĉiutage same kiel en ordinara porinstruista seminario. La partoprenantoj perferktiĝas en Esperanto, ili ellernas la lingvon kaj ĉeestas dum kolego instruas al 11—14 jaraj infanoj. Tiel ili ricevas la kuraĝon por siavice roli kiel instruanto. La kritiko de la kolego kaj

gvidantoj estas utila al ĉiuj. Ni esperas reokazigi similan seminarion ĉiusomere, por ke baldaŭ estu en nia lando aro da lertaj gvidantoj instruantaj Esperanton en sia lernejo.

(„La Juna Vivo.")

J. Dedieu, 3 rue Arzac, Toulouse.

Societo de Britaj Esperantistaj Geinstruistoj

Dum 9 jaroj ni ekzistas kaj nun nombras 200 anojn, el kiuj la pliparto estas profesiaj geinstruistoj en ŝtataj lernejoj ĉiuspecaj. La nombro de 200 certe ne estas granda, sed ni plimultiĝos. Ni varbas niajn anojn diversmaniere, sed la plej efika rimedo estas la p e r s o n a influo. Anoncoj kaj raportoj en gazetoj ne helpas! Ni sukcesis akiri la konsenton de 18 eminentuloj en la eduka mondo esti niaj honoraj konsilantoj kaj ni enlistigis iliajn nomojn sur nian oficialan skribpaperon, kiu estas bonega varbilo. Ni starigis somerlernejojn ĉiujare dum unu semajno kun kreskantaj bonaj rezultoj. La plej bona propagando estas vigla lerneja klaso.

(„La Juna Vivo.")

V. C. Nixon, 183, Woodlands Park, Rd. Bourneville, Anglujo.

Ĉiujn Esp. eldonaĵojn pri Sokol kaj pri ĉehoslovaka Respubliko

vi ricevados regule sen pago, se vi anoncos vian intereson skribante al SOKOL-KONGRESO, Praha I, Národní 3, Ĉehoslovakio. Estas en preparo pluaj interesaj kaj valoraj eldonaĵoj.

Vizitu la ekspozicion en Kroměřiž, ČSR.

En 1948 translokiĝis la demokrata regna parlamento de la tiama aŭstria monarkio de Vieno al Kroměřiž kaj tie ellaboris la regnan konstitucion. Memore al tiu historia okazintaĵo eldonis la urbo Kroměřiž esperantlingvan il. informilon kaj invitas al partopreno de historia ekspozicio en somero 1948. Petu ĝin: Výstavni výbor, Kroměřiž, Masarykova nam., ČSR.

Esperanto Film-Grupo

Kiuj deziras reprezenti la Esperanto Film-Grupo-n en sia lando, bonvolu sin anonci grandnombre el ĉiuj landoj: Antwerpsestraat 45, Bergen op Zoom, nederlando.

Internacia Komerca Societo

101, Z. W. Buitensingel, Hago, nederlando, serĉas geesperantistojn, kiuj kapablos organizadi.

Sunamikoj, venu Svedujon!

Sunamikoj el la tuta mondo feriados malkare kaj agrable en niaj naturbelaj somerkampoj en la insularo de la Balta Maro. Pro detaloj senprokraste skribu al: Norda Sunsporto, Götgatan 124, Stockholm.

Praktika propagando por Esperanto

La firmo L. De Boer kaj Zonen, komercanta per florsemaĵoj en Haarlem, Templierstraat 49 rd., Holando, presigis sur ĝia ilustr. prospekto holandlingve la alvokon: „Uzu Esperanton por via internacia korespondado!" — La firmo certe meritas laŭdon pro tio, sed ankoraŭ pli efike estus, se ĝi eldonus estonte siajn prospektojn holand- kaj E s p e r a n t lingve. — La red.

Praktika propagando kun pedagogia valoro

La franca progresema edukmovado „Presarto en lernejo" havas Esperantorakon kaj organizas kolektivan internacian korespondadon por la lernantoj, kiuj ankoraŭ n e konas Esperanton.

La instruistoj de la korespondantaj lernejoj faras la necesajn tradukojn, kiuj ebligas la interŝanĝon de dokumentoj. De antaŭ unu jaro ni rilatigas 20 francajn lernejojn kun 20 eksterlandaj. La lernejaj inspektoroj interesiĝis pri la dokumentoj valoraj laŭ pedagogia vidpunkto kaj la lernantoj entuziasmiĝis pri tiuj interŝanĝoj, kiuj kreis ĉe ili la deziron lerni Esperanton.

Tiamaniere Esperanto estas pli konata. Tre malmulte da laboro postulas nia sistemo: unu sendo ĉiumonate laŭ difinitaj kondiĉoj. Pro tio ĉiu koleg(in)o povas kaj devas kunlabori. Temas pri utila Esperanto-praktiko. Volonte mi interkontaktigos vin kun alilandaj gekolegoj. Adreso: Lentaigne, instruisto, Balaruc les Bains (Her.), Francujo. („La Juna Vivo.")

Viena printempa foiro 1948

La Viena foira akcia societo sciigas, ke la internacia Viena printempa foiro okazos en la semajno de la 14-a ĝis 21-a de Marto 1948. Por veturoj al kaj de la foiro la aŭstriaj federaciaj fervojoj donas dudekkvinprocentan rabaton. Dum la foiro estas du antaŭtagmezoj nur por la intertraktadoj de la en- kaj eksterlandaj vizitantoj kun la ekspoziciantoj. Dum tiuj tempoj oni povos eniri la foirejon nur per legitimacioj de la eksterlandaj kaj ekstervienaj vizitantoj kaj per specialaj legitimiloj de interesitoj.

Bibliografio

„UKRAINA ESPERANTISTO" — estas multobligita bulteno de la Ukraina E-movado en la okcidentaj zonoj de Germanujo. Adreso: Ukraina Esperantisto, (13 b) Augsburg-Göggingen, Schließfach 6, Bayern, U. S.-Zone. Gi estas eldonata de ukrainaj esperantistoj vivantaj nuntempe en Germanujo, kiuj pro politikaj kialoj ne volas aŭ povas hejmeniri en sian devenlandon.

Novaj Esperanto-Historietoj de diversaj aŭtoroj.

(Formato 21×15 cm, 72-paĝa, bonega papero, tre klara preso; eldono de Dansk Esperanto-Forlag, Inngemannsvej 9, Aabyhj, Danlando; mendebla per E-eldonejo „Tramondo', Vieno I., Neutorgasse 9).

La belaspekta, broŝurita libro enhavas 70 historietojn, plejparte humorajn el la ĉiutaga vivo.

La stilo estas simpla kaj klara, la vortoj kun malmultaj esceptoj laŭfundamentaj.

Tre taŭga legaĵo por kursoj kaj grupvesperoj, kiu faciligas la paroligon de la partoprenantoj per rerakonto kun propraj vortoj.

Carl Gasperini.

Ĉe la Sanktaj Akvoj. Romano el la Svislanda montegaro de J. C. Heer, unua parto. Tradukis A. Bader, P. le Brun kaj J. Schmid. Eldonis Svisa Esperanto-societo, Bern 1947. Broŝurita, 81 paĝoj, formato 16×23 cm, prezo 3 sv. fr.

Belaspekta libro kun neta preso sur bona papero, faras jam unuavide plaĉan impreson. La tutpaĝa kovrilfotografaĵo montras laboriston riparantan akvokondukilon sur preskaŭ vertikale kruta rokego alte super valo, malantaŭ kiu fonas aliaj altaj montoj, parte neĝkovritaj. La bildigita heroo de la rakonto estas simpla falĉisto, kiu libervole dediĉis sin al la montegara komunumo por ripari pramalnovan akvokondukilon, detruitan de lavango. Je la fino de sia tuttaga laboro li akcidente mortfalas de la rokego, postlasante bravan edzinon kaj tri infanojn.

La titolo de la libro estas devenigita de legendo, laŭ kiu la alte konstruita akvokondukilo el la regiono de neĝmontaro estas urĝe necesa por akvumi la montajn vinberejojn, kiuj ĉefe vivtenas kaj famigas tiun ĉi regionon. Cetere la romano priskribas la vivmanierojn, intrigojn kaj epizodojn de la intermontaj vilaĝanoj kaj donas bonajn imagojn pri la tieaj naturo kaj homoj.

La traduko estas sufiĉe flua kaj bonstila; gramatikaj nekorektaĵoj, neologismoj kaj preseraretoj estas tiel malmultaj kaj ne gravaj, ke ili apenaŭ estas menciindaj.

Oni povas sincere rekomendi la libron kaj gratuli la eldoniston. Pebe.

Du amosentaj noveloj: Imenlago de Thedor Storm, Maruŝka de Mela Escherich, tradukitaj de Alfred Bader el germana lingvo.

Kiam vi tralegas la tradukon de tiuj ĉi amosentaj noveloj, vi vere ĝuas plezuron. Vi gajnas la impreson de lerta laboro kaj de senerara uzado de nia amata helplingvo. Do bonega, kontentiga konstato!

Ĉu sed tiu ĉi impreso daŭras, se vi apudmetas la originalon kaj kontrolas la frazojn?

Ne. Domaĝe!

Certe kaj volonte vi pardonas la troan aliformiĝon de la germanaj vortsekvoj kaj lingvaj bildoj. Ankaŭ la traduko estas memstara artoverko, ĉu ne? Eĉ eble estas, ke la traduko pli bona estas ol la originalo.

Sed vi ne povas, vi ankaŭ ne volas, pardoni miskomprenojn kaj misformiĝojn de vortoj (kaj tiamaniere de opinioj kaj sentoj) de la poeto.

Kelkaj ekzemploj el nur unu alineaĵo parolu mem!

Ĉu oni estas prava, se oni tradukas la germanan frazon „Hier (en la ĉambro) war es heimlich und still" per „Tie ĉi regis sekreta silento?" „Heimlich" ja ne signifas „sekreta"! „Heimlich" estas „hejma"!

„Gegend" estas „lando"? Sur la muro ne pendas figuraĵo (pli bone estas „bildo" aŭ „ilustraĵo") de lando, sed de pejzaĝo.

„Peza apogseĝo" estas „ein gewichtiger, ein schwerer Lehnstuhl", sed ne ein schwerfälliger. „Schwerfällig" oni povas esprimi ekzemple per „malgracia".

Tute malĝuste estas traduki „Bilder an der Wand" per „pentraĵoj de l'muro."

Domaĝe. La tradukisto certe estas lerta Esperantisto. Iom pli de memdisciplino estus evitinta tiajn fuŝetojn.

Do: ĝuo restas nur por tiuj legantoj, kiuj ne prenas scivoleme la originalon kaj metas ĝin apud la tradukon. Tamen mi opinas, ke ankaŭ ili postulas: traduko estu spegulbildo de originalo, ĉar nia Esperanto eble estas la sola lingvo, kiu tion ebligas. Schauhuber.

ATENTIGO DE LA REDAKCIO

Ni devas atentigi nian legantaron, ke la manko de diversaj supersignoj super la literoj s, g, c ktp., precipe grandliteroj, n e estas preseraroj, sed la presejo provizore ne disponas pri la respektivaj Esperantoliteroj. Kvankam laŭ Fundamenta regulo ni devus anstataŭigi ĉi tiujn mankantajn literojn kun supersignoj per aldono de la litero h — ekzemple anstataŭ ĝ skribi gh — ni tamen pro unueco de la presaĵo prefere evitas ĉi tiun skribmanieron, ĉar ĝi ne nur nebone impresus, sed ankaŭ povus erarigi komencantojn en la lingvo.

Ni estas certaj, ke ĉiuj legantoj kapablas spirite anstataŭigi ĉi tiujn mankantajn supersignojn sen miskompreni la respektivan literon, vorton aŭ frazon.

Aldonaj raportoj al paĝo 28:

Landa organizo de AEF en Oberösterreich

La 15. 2. 1948 okazis en Linz la ĝen. kunveno de la Landorganizo. Reprezentataj estis la grupoj el Steyr, Wels und Linz. En la estraron de la Landorganizo estis unuanime elektataj: Karl Wannek, estro; Karl Franz kaj Joh. Bürger, vicestroj; Karl Nigl, sekretario; K. Kepplinger, kasisto; A. Saßmann, propagando; Mathilde Diller kaj J. Bürger, kontrolantoj.

El Wien partoprenis la s-anoj R. Cech, E. Vokal kaj G. Katzianka, kiuj transdonis la salutojn de la centra estraro kaj faris diversajn interesajn paroladojn kaj raportojn.

La nova estraro de la Landorganizo klopodos ĉiuforte plenumi siajn taskojn kaj antaŭenpuŝi la E-movadon en nia federacia lando.

Eigentümer und Herausgeber: Österreichischer Esperantisten-Verband. Verlag: Tramondo. Verantwortlicher Redakteur: Alfred Berdan, sämtliche Wien I., Neutorgasse 9. Druck: Holzwarth & Berger, Wien I., Börseplatz 6. Papierzuweisung 101/47/10—12/ Bezugscheinnummer 61/86.

Esperantistoj, aĉetu ĉe Esperantistoj!

Unua listo de firmoj kaj vendejoj, kie oni parolas Esperanton:

H. Funke & Co., elektroteknikaj fabrikoj Wien kaj Mattersburg, soc. k. l. g.: instaloj, lumigiloj, ilarkonstruo — Wien I., Neutorg. 9.

Elektro-Südost (-Elektro-Sudoriento), grandkomerco je elektroteknikaĵoj — Wien I., Werdertorgasse 3.

Tramondo, Esperanto-librovendejo kaj -eldonejo, soc. k. l. g. — Wien I., Neutorgasse 9 — produktas kaj vendas ne nur Esperantajn, sed ankaŭ germanlingvajn kaj aliajn verkojn.

Gastejo Elisabeth Frey, Wien VIII., Alserstraße 63a.

Gastejo Zboril, Wien VII., Sigmundgasse 14, kunvenejo de la Esperantosocieto „Danubio".

Prochaska und Alt, vendejo por teksaĵoj kaj diversspecaj varoj — Wien IV., Wiedner Hauptstraße 52.

Jos. H. Kaindl, vendejo de feraĵoj kaj kuriloj — Wien VI., Mariahilferstraße 77.

Margarethe Moser, stampiloj — Wien X., Favoritenstraße 90.

Ernst Majtanič, frizisto — Kalksburg ĉe Wien, Breitenfurterstr. 36.

Rudolf Bartosch, fotografisto — Horn, N.-Ö., Spitalgasse 5.

Wüster & Co., ferlamenadejo kaj laborilfabrikoj; specialaĵo: segiloj ĉiaspecaj por ligno — Wieselburg, N.-Ö., kaj Schwanenstadt, O.-Ö.

Ernst Moser, muzikaĵvendejo — Wels, O.-Ö., Stadtplatz 47.

Karl Linek, komerco je legomoj kaj fruktoj — Ried i. I., O.-Ö., Bahnhofstraße 27.

F. Weißkirchner, dentisto — Ebensee, O.-Ö., Marktgasse 1.

Fred Sibitz, tabakvendejo kaj grandkomercisto — Bruck a. d. Mur, Stirio, Koloman Walisch-Platz 8.

Karl Dürrschmid, librokomercisto, Klagenfurt, Karintio, Hoffmannsgasse 4.

Noto de la redakcio:

De nun ni publikigas de tempo al tempo tian liston de „Esperantejoj", t. e. firmoj, vendejoj aŭ butikoj, kie almenaŭ unu deĵoranto scipovas Esperanton. Esperantistaj komercistoj kaj Esperantistoj, kiuj deĵoras en lokoj, kie ili povas per Esperanto servi al klientoj, anoncu vin! Ni enpresigos viajn nomon, titolon kaj specon de la firmo kaj adreson, unufoje ĉiujare senpage.

Krome vi mem aŭ al vi konataj firmoj povas mendi pagotajn anoncojn laŭ la jena tarifo: tuta paĝo 200.— ŝ, duona paĝo 100.— ŝ, kvarona paĝo 50.— ŝ kaj okona paĝo 25.— ŝ.

Vbb (Zl. 3216/1947)

En la Esperanto-eldonejo

TRAMONDO

Vieno I., Neutorgasse 9

aperis jenaj Esperanto-libroj:

	aŭstr. šil.
„Freude durch Esperanto“, lernlibro de Hugo Steiner	6.—
„Esperanto, Kurzer Lehrgang in 30 Lektionen“ eldonita de la Aŭstria Esp. Federacio	3.50
„Grundsätze des Fremdsprachunterrichtes “prilaborita kaj eldonita de la Aŭstria Esperanto-Instituto	6.—
„Esperanto-Deutsch, Handwörterbuch (vortaro), eldonita de la Aŭstria Esp. Instituto, 103 pĝ.	9.—
„Senhalte al la celo“ facila legolibreto de Alois Norbert, 51 pĝ. .	4.—
„Kantaro de la Aŭstria Esp.-Federacio“ 24 pĝ.	2.—
„La mondopaco kiel psikologia problemo“ de Hans Thirring, tradukita de Hugo Sirk, 36 pĝ.	3.—
„Tri majstronoveloj“ (Kleist: La tertremo en Ĉilio, Storm: Veronika, Stifter: El „La Kondoro“) tradukitaj de E. Pebe. 32 pĝ. . .	5.50

Krome estas per la librovendejo „Tramondo“ haveblaj jenaj, jam antaŭe aperigitaj libroj:

„Tabeloj por la intua instruado de Esperanto“ de Franz Meŝtan . .	1.50
„La mortado“ de H. Nothnagel, tradukita de B. Selzer, 26 pĝ. . .	2.—
„La malgranda helpanto“ malmultekosta instru- kaj legolibreto por komencaj Esperantokursoj („Verda Biblioteko“, 1936)	1.50
El „Steffel-eldonejo“, Vieno:	
„Junaĝo“, de Anton Stieger, tradukita de F. Th. Bischof . . .	3.—
„La kvar paĝoj de la mondo“, de la sama aŭtoro kaj sama tradukinto	2.—